


esperanto

MAJO 1990 • 83-A JARO • N-RO 1013 (5)



Kia noto por UEA en 1989?

Raporto de la Estraro.

Enhavo

Estrara raporto: Universala Esperanto-Asocio en 1989

- 89 Enkonduko
Ĝeneralaĵoj: Strukturo kaj konsisto, Gvidorganoj, Strategia Plano
- 91 Administrado: Personaro, Instalaĵoj, Servoj
- 92 Financo: Ĝeneralaj konsideroj, Spezokonto, Bilanco
Institucio Hodler
- 93 Periodaĵoj kaj serioj: Revuo *Esperanto*, *Kontakto*,
Esperanto-dokumentoj
- 94 Kongresoj: 74-a Universala Kongreso de Esperanto,
Infana Kongreseto, 45-a Internacia Junulara Kongreso,
Estontaj kongresoj, Kongresa fako
- 95 Informado
- 96 Eksteraj rilatoj: Unuiĝintaj Nacioj, Unesko, Eŭropaj instancoj,
Aliaj agadoj
- 97 Landa kaj regiona agado: Landaj asocioj, Azia agado,
Afrika agado, Sudamerika agado
- 98 Junulara sekcio (TEJO): Gvidorganoj kaj administrado, Servoj,
Movada agado
- 99 Kulturo
- 100 Edukado
- 101 Faka agado kaj scienca aplikado: Fakaj asocioj, Scienca aplikado,
Eldonagado, Terminologia Esperanto-Centro
- 102 Esploro kaj dokumentado
Fondumo Zamenhof
Finaj vortoj
- 103 Financaj aldonaĵoj: Spezokonto, Bilanco, Fondaĵoj, Rezervoj,
Buĝeto 1991
Fino de la Estrara Raporto 1989
- 107 Tri manieroj helpi al UEA
- 108 Tabelo de la internaciaj radio-elsendoj en Esperanto

Vi trovos,

ke ĉi-foje ni vere klopodis prezenti la jarraporton de UEA en klara kaj leginstiga vesto. Tiucele ni rezignis pri la enmeto de aliaj aferoj, krom la radiotabelo, ĉar ĉion kompensas via legado kaj pripensado de la teksto. Kial zorgi pri tio? vi eble demandas. Nu, tutsimple, ĉar la pluekzisto de la Asocio dependas de vi: de via daŭra subteno, via varbado de aliaj, via loka kaj internacia Esperanto-vivo.

Ĉi tiaj raportoj facile aspektas kiel komunikoj desupre aŭ decentre. Sed en realo ankaŭ la Estraro kaj Oficejo situas periferie, kaj ili, same kiel vi, facile imagas sin tiel izolitaj, kiel loĝanto en plej fora angulo de Saharo. Ĉirkaŭ la oazeto de la propra agado siblas la dezerta vento. Nur la poŝto kaj telefono alportas regule la signojn de aliloka vivo, ke ekzistas pliaj oazoj; kaj se ili eksilentas, enŝteliĝas la teruro de soleco. Facile oni rezignas, sen kunagantoj. Tial ĉi tiu raporto: ĝi diras al vi, ke aliloke la oazoj vivas kaj prosperas. Ie estis pluvo kaj fruktabundo; ie longa sekeco minacas la palmojn. Sed ĉie la lukto daŭras. Kaj ankaŭ en tiuj aliaj lokoj la homoj atendas novaĵojn, interalie pri vi mem.

Akceptu ĉi tiun raporton do kiel amikan leteron. Ĝuu la novaĵojn pri foraj konatoj, pri la vetero kaj tio, kion skribas la gazetoj. Kaj sendu foje respondan leteron. Alia oazo ĝojos pro tio.

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj.

Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 48,75; US\$ 23; GM 43; enoj 3600; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1540, 1/2 p. 850, 1/4 p. 470, 1/8 p. 260, 1/16 p. 150. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: +3110 436 17 51.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: vakas.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (01) 542 0302; telefakso (01) 383 4108.

Vicprezidanto (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, u. Majdańska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemarckenstr. 150, D-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 680 32 50.

Ĝenerala Sekretario: s-ro Osmo Buller, Suksitie 4 B 15, SF-93400 Taivalkoski, Finnlando; tel. (988) 51 003; telefakso (988) 51 681.

Estrarano (informado): s-ro Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, B-2520 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.

Estrarano (financo, junularo): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II.3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.

Estrarano (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11, Seoul - 158-600, Korea Respubliko; tel. (02) 646 5413; telefakso (02) 275 0633.

Estrarano (kulturo): s-ino Spomenka Štimec, Nova Ves 87, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio; tel. (041) 42 92 51; telefakso (041) 42 12 94.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendahl, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47; telefakso (1) 43 66 09 92.

Estrara raporto: Universala Esperanto-Asocio en 1989

Enkonduko:

Ŝanĝoj kaj disvolviĝo sojle de la 90-aj

La jaro 1989 portis al UEA novajn gvidorganojn, novan Strategian Planon, kaj novstilan membro-kampanjon. Plurajn el la landaj asocioj ĝi metis antaŭ radikalajn sociajn ŝanĝojn. Ĝi vidis plian disvolviĝon de la movadoj en Azio kaj Afriko, kvankam ekonomiaj kaj aliaj malhelpoj ne nur restis sed eĉ pliakriĝis. Ĝenerale fariĝis pli kaj pli klare, ke la kondiĉoj por la internacia uzo kaj disvastigo de Esperanto multrilate aliĝos dum la 90-aj jaroj.

Ĉi tiu Estrara Raporto skizas la agadon de UEA dum 1989. Ĝi provas resumi la plej gravajn aŭ karakterizajn evoluojn, sen resti nur ĉe ĝeneralaĵoj aŭ eniri troajn detalojn. Neeviteble en tia dokumento troviĝas mankoj kaj misemfazoj. Tamen ni esperas, ke la tuto prezentas fidindan kaj rekoneblan bildon pri la Asocio. Ĝin ricevas ĉiu individua membro de UEA, do ankaŭ tiuj kiuj ne abonas la revuon, kaj pliaj ekzempleroj haveblas laŭpete de la CO.

*Rondo ĉe la 45-a IJK en Kerkrade diskutas pri la azia movado.
UEA kaj TEJO ludas ĉiam pli gravan rolon en la kunligado
de la eŭropa esperantistaro kun la cetera mondo.*

Foto: A. Sochacki



Kiel renoviĝi sen perdi kontinuecon

STRUKTURO KAJ KONSISTO

Kvankam ne okazis ŝanĝoj en la Statuto kaj Ĝenerala Regularo en 1989, la dua estas reviziata, kun la celo prezenti projekton de ĝi al la Komitato en Havano.

Aliĝis al UEA 5 novaj landaj asocioj: Eburborda E-Asocio, Latvia E-Asocio, Litova E-Asocio, Pakistana E-Asocio, kaj Sovetrespublikara Esperantista Unio. Kunlaboran kontrakton oni subskribis kun la faka asocio Movado sen Nomo. Nun UEA havas 49 aliĝintajn landajn asociojn.

La jaro finiĝis per rekorda nombro de individuaj membroj – 7355 (kompare kun 7203 en 1988), kio detaliĝas jene: Membro-Gvidlibro 653 (pasintjare 671), Membro-Jarlibro 1426 (1344), Membro-Abonanto 3849 (3817), Dumviva Membro 959 (955), Honora Membro 38 (34), Juna Membro-Jarlibro 249 (223), Juna Membro-Abonanto 181 (159). Tiu kresko okazis malgraŭ la kotizaltigo kaj parte jam reflektante la sociajn ŝanĝojn en orienta Eŭropo. Sovetianoj, kiuj unuafoje havis eblecon kotizi en sialanda valuto, kreskigis sian individuan membraron je 50%. Notindas ankaŭ la kresko en la junularaj kategorioj, kvankam la decido altigi la aĝlimon en TEJO ekvalidis nur ekde 1990.

Aliflanke, la nombro de la aligitaj membroj malkreskis – 39 829 (pasintjare 43 148). Tio ŝuldiĝas preskaŭ ekskluzive al la financaj problemoj de Pola E-Asocio, kiu en 1989 pagis por 3364 aligitaj membroj malpli ol en 1988. La pasintjara akcepto de 5 novaj landaj asocioj ne influis la aligitajn kotizojn en 1989.

La Komitato nomis en Brajtono kvar novajn honorajn membrojn: s-ron Douglas B. Gregor (Britio), prof. Stojan Ĝuĝev (Bulgario), s-ron Alec Venture kaj s-ron Norman Williams (Britio). Forpasis Miyamoto Masao kaj Józef Toczyski. Fine de la jaro UEA havis 38 honorajn membrojn.

En 1989 estis 164 membroj de Societo Zamenhof kompare kun 154 en la antaŭa jaro. Dum la 74-a UK en Brajtono okazis la tradicia akcepto fare de la antaŭa kaj nuna prezidantoj de UEA.

La Jarlibro 1989 (p. 386) montras, ke la nombro de la membroj plenu-

mantaj diversajn taskojn en la Delegita Reto estis 2319 (pasintjare 2305), kaj la nombro de delegitecoj 3164 (3126).

Fine de 1989 ni lanĉis grandan varbakampanjon, kies unuajn rezultojn ni atendas en 1990. Interalie la Oficejo produktis novajn varbilojn por UEA kaj TEJO, kun poŝtkartformata aliĝilo, kaj komencis dissemi ambaŭ tra la movado. La distribuado kaj aliaj paŝoj daŭras en 1990.

la Estraro sur la dua kovrilpaĝo de ĉi tiu revunumero.) Sep estraranoj kunsidis en Brajtono, dum plenkunsido okazis septembre en la CO. Kvankam la Estraro konsistas el 8 novaj membroj, ne perdiĝis la kontinueco i.a. pro la helpo de antaŭaj estraranoj, kaj la Estraro harmonie ekagis.

Laŭ la pasintjara Raporto ekzistis, almenaŭ surpapere, 32 komisionoj kaj komisiitoj. Pro la ĝenerala malkontento pri ilia nefunkciado, la Komitato en Brajtono elektis nur 2 komisionojn (Financo, Internaciaj Aranĝoj) kaj komisiis al la Estraro trovi kaj elekti pliajn komisionojn kaj komisiitojn, kiuj do restu sub ĝia respondeco.

Por la posteno de demisianta prezidanto H. Tonkin (dekstre, apud la same forironta ĝen. sek. F. Szabó-Felső) amike konkursis Y. Umeda kaj elektoto J. Wells (staranta).



GVIDORGANOJ

En 1989 okazis elekto de nova komitato. La malnova konsistis el 86 membroj (65 A, 7 B, 14 C) plus 6 observantoj. En la nova Komitato (por la periodo 1989-1992) troviĝis fine de la jaro 92 membroj (66 A, 8 B, 18 C) kaj 9 observantoj. La elektojn de la komitatanoj B partoprenis 1709 individuaj membroj. La Komitato kunsidis dum la 74-a UK en 9 sesioj; krome, en oktobro okazis 1 skriba voĉdono.

Ĝis Brajtono funkciis 8-membra Estraro sub prezido de d-ro Humphrey Tonkin. Ĝi kunsidis en Roterdamo en marto kaj komence de la UK. En Brajtono elektigis nova 9-kapa Estraro, kiun prezidas prof. d-ro John C. Wells. (Vidu la konsiston kaj taskodividon de

La Estraro grandparte sukcesis en tio, i.a. draste revizianta la fakojn kaj agadkampojn. Vidu la liston en Jarlibro 1990 (p. 21).

STRATEGIA PLANO

La Komitato akceptis en Brajtono la finan version de ĉi tiu baza dokumento de UEA, kun la kompreno, ke ĝi daŭre restu malferma al kompletigoj kaj ŝanĝoj. La origine dua parto de la Strategia Plano fariĝis aparta Laborplano de UEA por la periodo 1989-92, kiu donas gvidliniojn por la evoluo de la diversaj agadoj de la Asocio kaj laŭ kiu oni elverku specifajn subplanojn por unuopaj fakoj, landoj, regionoj ktp. La tuto aperis broŝurforme kaj estas havebla ĉe la CO.

La domo pli sekuras, la maŝinoj pli modernas

PERSONARO

Dum 1989 jenaj geoficistoj tutjare laboris en la CO: M. Fettes (redaktoro, *Esperanto*), I. v.d. Krans (membraro, librotendado), R. McCoy (kompostado), I. Merceij (purigado), S. Milojević (ĝenerala direktoro), R. Moerbeek (ekspedoj, provlegado), F. J. Moleón (redaktoro, Jarlibro), N. Rašić (kongreso), N. Salvesen (direktoro CO), M. Stanley (financo), kaj P. Zapelli (libroservo). En aprilo al la stabo aliĝis K. Prusakowski (sekretariado) anstataŭ J. Jurczynski, kiu eksterofice konservis nur kelkajn taskojn faratajn por la CO. Ĉar tri oficistoj laboris nur parttempe, la meza nombro de oficistoj restis sama kiel en 1988 - ekvivalento de 10,3 plentempaj homoj.

Kvankam la CO dum 1989 ne dungis tutjaran volontulon, pluraj personoj pasigis kelkajn monatojn en la Oficejo en la kadro de la Volontula Servo. De majo ĝis aŭgusto s-ro M. Reza Kheyr-khah (Irano) kaj Izabel C. Oliveira Santiago (Brazilo) valore helpis ĉefe en la kongresaj laboroj, dum s-ino Xue Meixian (Radio Pekino) studrestadis en la CO de aŭgusto ĝis novembro. Ankaŭ s-ro Jukka Pietiläinen (Finnlando) valore kontribuis al la laboroj de junio ĝis septembro. Meze de novembro venis David Ryan (Nov-Zelando) kun la ideo resti unu jaron kaj voluntuli duone por TEJO kaj duone por UEA; tamen, en januaro 1990 li ricevis stipendion por plustudi en Meksikio kaj akceptis tion. Kelkaj aliaj volontuloj restadis en la CO dum malpli longa tempo. Kutimaj enlandaj volontuloj ne mankis en la CO ĉefe ĉe grandaj ekspedlaboroj: N. Moerbeek, A. Childs-Mee, J. Calado, J. Jurczynski, M. Prusakowski k.a. Fred de Geus daŭre liveris valoran helpon pri la aŭtomatigo de la abon- kaj libro-serva laboroj.

Tri novaj ĉefdelegitoj estas nomitaj: s-ino Margit Evva (Hungario), s-ro A. Golonka (Pollando) kaj s-ro A. Melnikov (Sovetunio). S-ro T. Elliott transprenis la taskojn de peranto en Aŭstralio, kaj s-ino G. Sutton iĝis peranto en Nov-Zelando. La Centra Oficejo lanĉis novan cirkuleron por la ĉefdelegitoj kaj perantoj, *La reto*, kiu



*Nova ĉefdelegito por Sovetunio
A. Melnikov unuafoje peris kotizojn
en rubloj, ebligante kreskon de la
sovetia membraro.*

aperis en 1989 en kvar numeroj kaj kontribuis al granda plibonigo de la informfluo.

INSTALAĴOJ

Fronte al ripeta ŝtelista enrompo komence de 1989 en la CO (tamen sen financaj konsekvencoj, pro la adekvata asekuro), estis decidite investi pli ol 20 000 gld. por komplete sekurigi la asocian sidejon de similaj estontaj invadoj, samkiel de subita incendio. Nia sekurecstemo nun estas rekte ligita al landa centralo, kiu ene de sekundoj telefone reagis al provoj de enrompo (tiaj ja okazis) aŭ al detekto de ekstra fumĉeesto en la domo (ankaŭ tio jam okazis). Ni vastigis ankaŭ la asekuron, tiel ke ĝi nun kovras ankaŭ damaĝojn pro inundo, riskojn ĉe montransporto k.s.

Multe progresis la pasintjare komenca aŭtomatigo, dank' al F. de Geus kaj ebleco telefone ligiĝi per modemo kun la CO, kie ĉi-rilate kunlaboris P. Zapelli. Meze de la jaro ni aĉetis

laseran tajpilon (16 600 gld); tio nun ebligas finprodukti kompostajn laborojn en la CO sen la antaŭa neceso pagi tion al eksteraj instancoj. Kvankam ni spertis ĉi-rilate iom da kutimaj komencaj problemoj pri la tekniko kaj kvalito de la kompostaĵoj, tiu investo repagos sin mem ene de jaro kaj duono.

La instalo de telefakso (telekopiilo) en 1988 montriĝas ege utila (kaj malmultekosta) por rapida komunikado ne nur kun la estraranoj kaj komitatanoj, sed ankaŭ kun la landaj asocioj kaj individuaj klientoj. Ni intertempe aĉetis la antaŭe luitan teleksilon, kiu ankoraŭ montriĝas esti la sola rapida ligo kun kelkaj mondopartoj (Ĉinio, Kubo, Sovetunio). Dum 1989 estis instalita en la CO ankaŭ pli moderna fotokopiilo.

SERVOJ

La Jarlibro 1989 ekspediĝis al la membroj komence de majo. Ĝiaj unuaj 128 paĝoj konsistigis Gvidlibron. La tuta Jarlibro ampleksis, kiel kutime dum la lastaj jaroj, 400 paĝojn. La grafikaj laboroj okazis parte en la CO kaj parte en la Grafika Centro Antverpeno.

Aperis en 1989 kvar titoloj ĉe UEA: *Bibliografio de disertacioj pri Esperanto kaj interlingvistiko* (Symoens), *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*, 2-a eldono (Wells), *Lingvo kaj vivo*, 2-a eldono (Waringhien), *Saluton!*, 5-a eldono (Childs-Mee). Krome, sed ĉefe, kompletigis la relanĉo de pli ol 70 Stafeto-titoloj de Juan Régulo-Pérez, kiujn UEA finpretigis kaj relanĉis en 1988/89 investante en tiun entreprenon sume pli ol 230 000 gld. La stokoj de la Eldona Fakto fine de la jaro valoris 386 000 gld. post vendo por la sumo de 75 000 dum la jaro. La neta profito de la Eldona Fakto en 1989 estis iom malpli ol 15 000 gld.

La vendoj de la Libroservo sumiĝis je 276 000 gld., kaj ĝia neta gajno estis ĉ. 64 000 gld. Laŭ la komitata decido ni nun unuafoje en la financaj aldonaĵoj de ĉi tiu Raporto prezentas la spezojn de la Libroservo aparte de la Eldona Fakto. Se oni komparas la vendosumon kun la fakto, ke la stokoj de nepropaj eldonaĵoj ĉe la Libroservo jarfine valoris iom malpli ol 200 000, facilas konkludi, ke la Libroservo havas bonan investopolitikon. Tio ne ĉiam estas asertebla pri la Eldona Fakto.

Fortika bazo donas kaŭzon por fido

ĜENERALAJ KONSIDEROJ

Ne malofte oni komparas la kontadon kaj financon de UEA kun spezokontoj kaj bilancoj de komercaj entreprenoj. Ofte oni opinias, ke nia negativa saldo estas komparebla kun deficita jara saldo de komerca entrepreno. La malĝusteco de tiaj komparoj klaras post emfazo de kelkaj bazaj faktoj: 1) UEA nek estas nek rajtas esti komerca entrepreno, ĉar ĝiaj Statuto kaj jura formo malebligas tion. Plie, ĉar ĝi ne estas tia entrepreno, UEA ĝuas plurajn impostajn kaj aliajn favoraĵojn, kiuj malaperus se ĝi estus komerca entrepreno. 2) Oni emas preteratenti la fakton, ke la kapitalo de UEA estas grandparte ŝparaĵo – kaj do efektiva posedaĵo – dum komerca entrepreno plej ofte ŝuldas sian kapitalon al la posedantoj de siaj akcioj. 3) Ĉe komerca entrepreno ĉiuj jaraj enspezoj enestas la spezokonton, dum ĉe UEA nur parto de la rimedoj eniras la spezokonton kaj alia parto iras rekte en la kapitalon de la Asocio. 4) Komerca firmao kun negativa saldo principe fartas malbone; UEA kun negativa saldo en la spezokonto povas finance farti tute bone, se ĝia kapitalo kreskas kaj bone fartas. Tial la spezokonto de UEA montras nur parton de la financa situacio de la Asocio. Por vere informiĝi pri la financa stato de UEA necesas atente studi ĝian bilancon.

SPEZOKONTO (vd. p. 103)

La Spezokonto por 1989 saldiĝas denove per negativa saldo de 85 000 gld. Tio okazis pro la fakto, ke al la buĝetita negativa saldo de 23 000 aldoniĝis la kostoj, kiuj superis la buĝeton je 27 000 kaj la rimedoj, kiuj restis sub la buĝetita sumo je 35 000 gld. Je la flanko de la kostoj okazis ŝparoj ĉe oficistaro (15 000), korespondkostoj (4 000), kaj ĝeneralaj kostoj (14 000), dum ni superis la buĝetitajn sumojn ĉe la revuo (20 000), Jarlibro (3 000, pro pli detala kalkulado de la elspezoj por tiuj du eldonaĵoj), vojaĝkostoj (14 000, pro nebuĝetita kunsido de la nova Estraro en septembro), kaj amortizoj (20 000, pro aĉeto de komposta komputilo kaj instalado de sekurecsistemo en la oficeja domo). Ĉe la rimedoj ni enspezis pli pro kotizoj (6 800), servoj (6 000), kaj rento (17 700). Malpli da rimedoj ol buĝetite portis donacoj (8 000), Libro-

servo kaj Eldona Fakto (kune 51 000, pro neapero de planitaj profitigaj titoloj, plus magra influo de la libro-vendoj en la UK), kaj kongresoj/turismo (7 000).

BILANCO (vd. p. 104)

La Bilanco fine de 1989 montras kreskon de la asociaj havaĵoj je 505 000 gld. kompare kun la antaŭa jaro. Tion ni ĉefe dankas al granda heredaĵo testamentita al UEA de s-ino Mantingh (Nederlando). Ĉe la bilanca flanko de Aktivoj elstaras malkresko de monrimedoj en bankoj (66 000), preskaŭ duobligo de la sumo investita en valorpapiroj (460 000 pli ol en 1988, ĉefe pro la menciita heredaĵo), samkiala ŝajna kresko ĉe debitoroj (45 000), kvankam la sumo de veraj debitoroj malkreskis je 78 000 gld. Librostokoj nun valoras 386 000 en propraj eldonaĵoj kaj 198 000 gld. en aĉetitaj varoj de aliaj eldonistoj. La valoro de maŝinoj kaj mebloj kreskis je 7 000 gld., dum pro deskriboj la valoro de nemoveblaĵoj malkreskis je 8 000 gld. Ĉe la bilanca flanko de

Pasivoj la sumo sub Kreditoroj estas provizore alta ĉefe pro la jarfina manko de la fina saldo de la 74-a UK en Brajtono. Gravas, ke la kreditaj saldoj de la membroj kreskis je 38 000 kaj tiuj de la ŝpardeponoj je 56 000 gld. La rezervoj ne multe ŝanĝiĝis, dum fondaĵoj iom kreskis. Esencaj estas la kreskoj sub Asocia Kapitalo: la du kontoj rilataj al dumvivaj membroj kreskis je 25 000. Kapitalo Azio "malkreskis" je 12 000, kio estas nur parta perdo de la antaŭa kurzgajno de 40 000; nun la tuta Kapitalo Azio estas deponita en guldenoj, dum se ĝi estus restinta en la originaj japanaj enoj, ĝi nun valorus nur ĉ. 375 000 gld. Cetera Kapitalo – tiu esenca kaj disponebla parto de la Kapitalo – kreskis je 338 000 gld., denove dank' al la menciita heredaĵo.

Konklude, spite la negativan saldon en la Spezokonto ne estas kialo paniki pri la ĝenerala financa stato de la Asocio. Atenti kaj bone mastrumi daŭre necesas, samkiel nepras daŭrigi la klopodojn igi la financajn super-rigardojn pli legeblaj kaj pli travideblaj. Tio nun estas farita rilate la disigon de la Libro-servo kaj Eldona Fakto, sed bonvenus iom post iom fari tion ankaŭ en pluraj aliaj kampoj de la asociaj spezoj.

Institucio Hodler:

IH eksubvencias denove

Post longa periodo de nefavora financa situacio, en 1989 Institucio Hodler retrovis iom da stabileco. La enspezoj dum la jaro sumiĝis je pli ol 33 000 gld., tiel ke la saldo disponebla por subvencioj kreskis al preskaŭ 18 000 gld. Tamen, ĉ. 14 000 el tiu sumo iris por kovri la sekvojn de la prunto kaj aliaj aranĝoj rilate la domon en Antverpeno, kiun posedas la Institucio. Efektivajn subvenciojn de po 1000 gld. ricevas por 1989: la Akademio de Esperanto, ILEI kaj Fondaĵo Canuto. Krome, la ŝuldo de la Institucio al UEA malkreskis dum la jaro de 88 000 gld. komence al 76 000 gld. fine de 1989. Cetere, la bilanco de la Institucio fine de la pasinta jaro montris aktivojn de pli ol 450 000 gld. Tie la ĉefan rolon ludas la valoro de la domoj en Antverpeno (333 700) kaj Roterdamo (108 700). La estraro de IH decidis provizore ne vendi la domon en Roterdamo, ĉar mankas akcepteblaj ofertoj.

La Institucio denove apelacias al la movada publiko por pligrandigi la kapitalon de la Institucio, tiel ke pli kaj pli da rento disponeblu por subvencii la diversajn projektojn kaj agadojn. En la antverpena domo ekzistas ankoraŭ kelkaj sennomaj ĉambroj, kies nomoj estas aĉeteblaj kontraŭ po 10 000 gld. Tian ĉambromon dum 1989 akiris s-ro Jules Verstraeten (Belgio) pro pluraj grandaj donacoj en la pasinteco. Ĉi tio implicas, ke eblas kvazaŭ ŝpari por ĉambromono disponigante al la Institucio senrentajn pruntojn. Pliajn detalojn ĉi-teme oni petu ĉe la prezidanto de Institucio Hodler. La estraro de la Institucio en 1989 konsistis el: G. Maertens (prezidanto), A. Mertens-Goossens, J. Verstraeten, C. van der Vlies, kaj J. Jurczynski (administranto). En aprilo 1990 la administradon transprenis J. C. Rapley.

Gravaj kontribuoj de ekster Eŭropo

REVUO ESPERANTO

Mark Fettes redaktis la 11 numerojn, ĉiun po 24 paĝoj. La kompostadon faris Roy McCoy en la Centra Oficejo, ekde februaro ankaŭ enpaĝigante la revuon per mikrokomputilo Apple Macintosh. Post la venko de komencaj problemoj, oni havis sufiĉe da sperto fine de la jaro por apliki radikalan revizion de la enpaĝigo ekde januaro 1990.

El la enhavo, apartan mención meritas la “esplorvojaĝo tra Azio” de Joachim Werdin; detalaj artikoloj pri la movadoj en Senegalio, Bulgario kaj Sovetunio (kaj ankaŭ pri la movadaj problemoj en Rumanio); kontribuoj de kvin antaŭaj redaktoroj okaze de la mila numero de *Esperanto*; kaj plurfoja traktado de terminologia kaj scienca agado. Kiel kutime, la marta numero prezentis sur pluraj paĝoj la kongresan landon, la junia numero enhavis la Estraran Raporton, kaj la septembra amplekse priraportis la kongresojn de UEA kaj TEJO.

La bibliografia rubriko “Laste aperis...” okupis pli ol 9 paĝojn. Entute 38 libroj ricevis recenzon (notinda estis ampleksa eseo de Nervi pri la plena poemaro de William Auld). Leteroj de legantoj plenigis pli ol 7 paĝojn en la rubriko “Reagoj”. Ĝenerale la revuo sukcesis prezenti diversajn vidpunktojn pri la temoj plej aktualaj en la nuntempa movado, kaj ĝis iu grado (ankoraŭ ne plene kontentige) informi kaj kundiskutigi organizaĵojn kaj unuopajn esperantistojn el ĉiuj kontinentoj. Kelkaj lingvaj disputaĵoj, disvastiĝintaj en la movado, kaŭzis iom da delikataj problemoj al la redaktoro.

La abonantaro restis stabila, krom ĉe kolektivaj abonoj, kiuj denove falis.

KONTAKTO

Leif Gunnar Nordenstorm redaktis la jarkolekton de *Kontakto*, kiu en 1989 ampleksis kvar 16-paĝajn numerojn. La grafikan prezenton daŭre prizorgis Guido Bayens kaj Hugo Fonteyn en Grafika Centro Antverpeno, kaj la provlegadon Rob Moerbeek en la Centra Oficejo. La nombro de membroj-abonantoj (MJ-K kaj MA-K) altiĝis per pli ol 10% kompare kun la antaŭa jaro, ĝis 430, sed kolektivaj abonoj falis per simila proporcio.

La enhavo restis tre diversa, kaj teme kaj stile. En ĉiu numero aperis kelkaj artikoloj – ne nepre la malplej interesaj – verkitaj per limigita vortprovizo. Ekstereŭropanoj grave rolis kiel artikolverkantoj. La plej multaj artikoloj bildigis diversajn kulturajn kaj aliajn aspektojn de la homa vivo; Esperanto nur malofte estis menciita. Entute *Kontakto* bone sukcesas eviti la kutimajn limojn de periodaĵo en Esperanto. La demisio de Nordenstorm kiel redaktoro markis la finon de sesjara periodo, kiun sekvis ŝanĝo en la stilo kaj enhavo ekde 1990.

ESPERANTO-DOKUMENTOJ

La eldonado de novaj dokumentoj haltis dum 1989. Redaktoro D. Masterman ne sukcesis finpretigi kelkajn

ekzistantajn projektojn kaj propravole demisiis. Nova redaktoro F. Lo Jacomo same renkontis neantaŭviditajn malfacilaĵojn kaj ne sukcesis eklabori antaŭ la jarfino.

Dum la jaro aperis represoj de kelkaj el la plej sukcesaj dokumentoj: *Esperanto – lingvo de la natursciencoj kaj tekniko* (25E), *Psikologiaj reagoj al Esperanto* (26E) kaj *Esperanto: A Review of Its Present Situation* (40A). Listo de ĉiuj mendeblaj titoloj haveblas de la Centra Oficejo.

La serio ne trovas tian utiligon fare de la landaj asocioj, kian ĝi meritas. Indas, ke pli da ili sekvu la ekzemplon de la finna asocio, en kies ekvivalenta nacilingva serio aperis en 1989 tri tradukoj el la Esperanta serio kaj el aliaj materialoj de UEA.

Leif Gunnar Nordenstorm finis sesjaran deĵoron kiel redaktoro de KONTAKTO.



Neprofesieco povas tamen sukcesi

LA 74-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La kongreso okazis en Brajtono, Britio, de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 1989, kun 2285 aliĝintoj el 56 landoj. La kongreson invitis Londona Esperanto-Klubo. La alta protektanto de la Kongreso estis lordo Wilson de Rievaulx, eksa ĉefministro, nun membro de la Supera Ĉambro, jam konata kiel subtenanto de Esperanto en Britujo. En la Honora Komitato estis dekduo da aliaj eminentaj figuroj el la brita socia vivo.

La kongresa temo "Lingvo kaj egaleco en internacia komunikado" estis tre oportuna por kongreso en la hejmlando de la angla lingvo. Debato pri Esperanto kaj la angla montriĝis tre populara programero. Iom da atento estis donita ankaŭ al aliaj lingvoj kaj kulturoj el Britio: la kimra kaj la skot-gaela. Al tio kontribuis ankaŭ postkongresoj en Kimrio, Skotlando kaj Respubliko Irlando (tiu ĉi estis eble la plej signifa internacia aranĝo en Irlando ĝis nun).

La gazetara atento ne atingis la esperatan nivelon, malgraŭ la aranĝo de aparta lanĉo en Londono (kiel parto de la antaŭkongreso) kun la celo altiri diplomatojn kaj eminentulojn kaj vekti la publikan intereson. Ties bone aranĝita programo ne kompensis la mankojn de la gazetara servo kaj invitaj preparoj: la gastoj malmultis kaj la ekstermovada eĥo modestis. Estis simile en Brajtono.

La organizon gvidis nova Konstanta Kongresa Sekretario, dungita malpli ol unu jaron antaŭ la kongreso. Tio donis al li bonan trejn-bazon por la venontaj kongresoj. La trejnado tamen kunportis ioman malekvilibron inter la bone aranĝita programa parto de la kongreso kaj relative lamaj loĝigo kaj transporto de kongresanoj. Eksterordinaran kontribuon al la sukcesa organiza disvolviĝo de la kongreso donis kelkaj LKK-anoj, precipe la brila sekretario Wilf Atkinson.

La arta programo havis kelkajn agrablajn surprizojn. Varme akceptiĝis la teatraĵoj *Kato sur varma lado-tegmento* de T. Williams, en plenumo de la germana grupo "Kia Koincido", kaj *La eta princo*, ludita de Barbara Łukaszewska el Bjalistoko. Ankaŭ brita trupo, jam konata pro *La graveco*

de la fideleco, bele sukcesis per *Kiel amas la aliuloj*, preskaŭ trihora moderna komedio de angla aŭtoro A. Ayckborne (membro de la Honora Komitato). La muzikaj programeroj de sovetiaj artistinoj Staneŝnikova kaj Puhova estis elstaraj, dum la slovaka rok-muzika ensemblo "Team" vekis entuziasmon precipe ĉe la pli juna kongresanaro. Kvankam tute alistila, la efiko de la nederlanda grupo "Kajto" estis ne malpli sukcesa. Ĝi cetere uzis la kongreson por lanĉi la unuan kompaktan diskon iam eldonitan en Esperanto.



Al la etoso de la UK kaj IJK multe kontribuis spontanaj prezentoj, kiel la kantado de Krys Ungar (Anglio) registrata de Andrzej Pettyn (Pola Radio).

La programoj de la Nacia Vespero kaj la Internacia Vespero estis markitaj per bonvola entuziasmo de britaj kaj alilandaj amatoroj, pli ol per alt-pinta kvalito. Tiaj aranĝoj ja estas indiko pri niaj artaj kapabloj. Pli severa selekto povas helpi altigi la nivelon, sed ne vere ŝanĝi la situacion kaŭzitan de malmultaj elektoeblecoj kaj modestaj financoj.

La 75-a UK estis finance inter la plej sukcesaj kongresoj. Krom zorga mastrado, al tio grave kontribuis falo de la brita pundo.

INFANA KONGRESETO

33 infanoj el 15 landoj ĉeestis la 25-an IJK en Rottingdean, najbare de Brajtono. Sub la gvido de UEA-komisiito C. Fettes, LKK-anino H. Fantom kaj internacia teamo de kompetentaj helpantoj, ĝi funkciis tre bone kaj kontentige tiel por la infanoj kiel por la gepatroj. Bedaŭrinde, ankaŭ ĉi-jare ne eblis eviti relative grandan deficiton, kvankam la kotizoj kovris la kostojn de la infanoj mem. Estas notinde, ke la IJK plej sukcesis kapti la intereson de la komunikiloj.

45-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

La 45-a IJK okazis en Kerkrade, Nederlando, kun pli ol 600 aliĝintoj, kio estas la plej granda IJK en okcidenta Eŭropo. La kongresa temo estis "Transporto". La agado de LKK estis multflanke modela, kaj denove evidentiĝis kiom la IJK dependas de la invitanta junulara organizo, pro manko de fortoj kaj sperto en la gvid-organoj de TEJO.

ESTONTAJ KONGRESOJ

La 76-a UK okazos en Bergen, Norvegio, de la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto 1991. Por la jaroj 1992, 1993 kaj 1994 la Estraro kaj Oficejo jam komencis trakti invitojn el Meza Eŭropo, Okcidenta Eŭropo kaj Orienta Azio.

KONGRESA FAKO

Komence de 1990 eklaboris kun la KKS en la kongresa fako ankaŭ John C. Rapley, kiel librotenisto. Tio kontribuas al la efikeco en la kongresa fako kaj povos boninflui la kvaliton de la kongresoj, tamen en si mem ne solvos la ĉefajn problemojn de la kongresa organizado kaj turisma agado en UEA. Ĉe ĉiu kongreso oni renkontas pliajn profesiajn taskojn kiujn la kongresa fako ne povas kontentige plenumi, dum turisma fako de UEA efektive ne ekzistas, krom kiel porokaza improvizo en la CO. La Asocio devos celi pli intensan evoluigon de tia fako kaj ĝian ligiĝon kun la kongresa administrado kaj politiko, kiel neekspluatita agadkampo kiu tre verŝajne montriĝos profitdona.

Harmoniigo: la ĉefa manko kaj bezono

INFORMA FAKO

Ekde la elektoj en Brajtono UEA denove havas estraranon (Ivo Durwael) specife taskitan pri informado. Okazis kunveno pri tiu agadkampo en la 74-a UK, kun utila diskuto pri laborplano. Reviziita plano estis dissendita al ĉiuj komitatanoj. En novembro aperis la unua numero de bulteno por informaktivuloj, *Influo*.

La unua prioritato de la Informa Fako (Durwael plus liaj kunlaborantoj en la Centra Oficejo) estas starigi kontakton kaj kunlaboron kun tiaj aktivuloj, pere de la bulteno kaj kelkaj modestaj informiniciatoj. Samtempe oni celas interŝanĝi ideojn pri (a) utilaj agadmetodoj, (b) evitindaĵoj, kaj (c) pli ampleksaj kampanjoj. En la revuo *Esperanto* aperas serio de artikoloj pri la principoj de merkatesploro kaj informado.

Inter la aliaj taskoj de la Informa Fako estas la dissendo de komunikoj al novaĵagentejoj, informado de la landaj asocioj, kaj prizorgado de la Internacia Ekspozicio de UEA. Pri la unua kaj la tria taskoj ĝi komencis jam

en 1989. Tri komunikoj estis senditaj al seso da internaciaj agentejoj en Nederlando, tamen sen evidenta reĥo. La du kompletoj de la Internacia Ekspozicio estis sufiĉe vaste uzataj en Nederlando kaj Japanio, kaj komencis veni petoj el aliaj landoj, i.a. Brazilo, Italio kaj Sovetunio. Oni pretigis lumbildajn kompletojn de la Ekspozicio por alternativa uzo.

LOKA AGADO

Sur internacia kampo, la plej rimarkinda informiniciato estis la telekopia dissendo de la unua paĝo de *La Esperantisto* okaze de ties centjariĝo en septembro. Gratulon meritas la laborgrupo en Berlino kiu elpensis kaj evoluigis la projekton. Nur 30 grupoj en 15 landoj rekte partoprenis, sed ankaŭ aliaj raportis sukcesan kontakton kun la gazetaro pro tiu datreveno.

En Eŭropo, la procezo de interŝtata integriĝo, la evoluigo de la aŭtomata tradukado, kaj la plifortiĝo de la verdula politika movado estis inter la novaĵtemoj kiuj donis oftan okazon

por informi pri Esperanto. Pluraj landaj asocioj profitas de la diskresko de "lingvofoiroj", kaj aliaj kreskigas sian utiligon de lokaj radiostacioj. Projekto lanĉita de nederlandano Hans Erasmus por informi eŭropajn instancojn pri la propedeŭtika valoro de Esperanto ricevis multan subtenon. La kongreso de TEJO altiris pozitivan atenton, precipe en la kongresa lando. Ekstereŭrope, intereson facile vekas vojaĝantoj kiel Joachim Werdin, kiu intervjuigis en deko da aziaj landoj.

Malfacilas doni superrigardon pri la informa laboro de individuaj landaj asocioj. Pluraj elektis difinitan celgrupon (studentoj, instruistoj). Aliaj funkciigas komisionojn pri, ekzemple, gazetaraj eltondaĵoj kaj reagoj, la organizado de seminarioj ktp. Plej sukcesaj iniciatoj ofte ŝuldiĝas al unuopuloj. Ĝenerale lamas la informfluo. Pliharmoniigo de la agado estos la ĉefa tasko de la Informa Fako en la venontaj du jaroj.

Kuba Esperanto-Asocio kaptas ĉiun okazon por prezenti Esperanton al la publiko, ekzemple per sportaranĝo ligita al ekspozicio en Havano.



Eksteraj rilatoj:

Novjorko, Bruselo kaj Strasburgo vidas pli da agado

UNUIĜINTAJ NACIOJ

La plej interesa evoluo de la jaro estis reviviĝo de aktiva Esperanto-societo en la sino de UN (Novjorko). Sub la gvido de junaj polaj oficistoj, tiu societo okazigas kursojn kaj informadas pri la internacia lingvo.

La regula informado pri Esperanto al la diversaj fakoj de UN kaj al la diversaj misioj daŭris pere de la Novjorka Oficejo de UEA. Tiu oficejo dissendis informilojn, novaĵleterojn kaj individuajn leterojn, kaj organizis intervenojn pri Esperanto en la debatoj kaj aliaj laboroj de neregistaraj organizaĵoj ĉe UN. En aprilo UEA skribis al la Ĝenerala Sekretario de UN pri la situacio de la esperantistoj en Rumanio.

1989 estis la lasta jaro de la bulteno *Mondo kaj ni*. Post la bedaŭrinda morto en 1990 de la redaktoro, Akiko Ŭusink-Nagata, la Estraro decidis ĉesigi ties eldonon.

UNESKO

La komisiito de UEA ĉe la pariza sidejo de Unesko, Barbara Despiney,

daŭre flegis la rilatojn kun homoj kies favora sinteno al Esperanto estas jam konata – interalie en la delegacioj al la 25-a sesio de la Ĝenerala Konferenco (oktobro-novembro 1989). La ĝenerala direktoro de UEA havis plurajn interparolojn pri Esperanta eldono de *Unesko-kuriero*, sed fine de la jaro ties realigeblo estis ankoraŭ necerta.

La Komitato pri la Jardeko de Kultura Evoluo akceptis la preparlaborojn por Centro Zamenhof en Varsovio kiel aktivadon kadre de la Jardeko. La nova Estraro nomis Elisabeth Schwarzer (FRG) komisiito pri la Jardeko. Nome de UEA, Hyacinthe Seka partoprenis Unesko-konferencon pri “Paco en la mensoj de la homoj” en Yamousoukro, Ebura Bordo.

EŬROPAJ INSTANCOJ

La malfermiĝo de la limoj inter okcidenta kaj orienta Eŭropo dum 1989 pligravigis la rolon de la Eŭropa Konsilio. UEA, kiu jam de 1986 estas registrita inter la neregistaraj organizaĵoj kunlaborantaj kun la Konsilio, unuafoje partoprenis en ties

jarkunveno komence de 1990. Rainer Heckhausen (FRG) estas nomita komisiito pri la rilatoj kun la Konsilio.

Fine de la jaro estrarano G. Maertens entreprenis paŝojn por revigligi la Eŭropan Esperanto-Centron en Bruselo, kiu prizorgas la rilatojn kun la Eŭropa Parlamento.

ALIAJ AGADOJ

En Bulgario formiĝis grupo el dek parlamentanoj-esperantistoj, kaj daŭre en aliaj landoj (ekz. Britio, Suda Koreio, Pollando) deputitoj agas unuope aŭ grupe favore al Esperanto. Sed mankas ankoraŭ plena superrigardo, kaj UEA celos provizi pli da internacia kunordigo al la landaj asocioj en la venonta periodo.

La homrajta organizaĵo Amnestio Internacia daŭrigis sian uzadon de Esperanto per aperigo de baza informfolio pri sia agado. Individuoj en diversaj landoj efike uzis Esperanton en la transdono de informoj al ties internacia sekretariejo en Londono.

“Unu lingvo por Eŭropo” fariĝis pli kaj pli ofta slogano en la eksteraj prezentoj de eŭropaj aktivuloj. (Ĉi tie: debato organizita de A. Menabene, Italio.)



Vojaĝantoj fortigis la lokan bazon

LANDAJ ASOCIOJ

Dum la unua parto de la jaro la koncerna estrarano, Jean-Louis Texier, finis la kompiladon de superrigardo pri la atingoj, problemoj kaj aspiroj de la landaj asocioj. Lia posteulo, Oskár Princz, uzas interalie tiujn rezultojn por kunordigi efikan kaj utilan respondon al la komunaj bezonoj. Kelkaj ĉefaj trajtoj: ĉiujare ĉ. 30 mil homoj partoprenas lingvokurson; ĉ. 20 mil homoj partoprenas iun renkontiĝon; la loka agado ampleksas ĉ. du mil klubojn-grupojn. Malfortaj estas la informa laboro kaj la faka (profesia) aplikado de Esperanto. La situacion jam komplikis la radikalaj ŝanĝoj en kelkaj landoj kun relative forta movado. Ĉie la tenado de la anoj post la fino de la kurso troviĝas inter la plej gravaj problemoj.

La Trofeon Fyne 1989 gajnis la usona landa asocio, Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA). Jam de du-tri jaroj ĝia membraro forte kreskas (laŭ individuaj membroj de UEA Usono nun atingis la duan lokon, post Francio), kaj cetere evidentiĝas bona organizo de la informado kaj administrado.

La aliĝo de tri asocioj el Sovetunio estis bonvena paŝo al plia internaciigo de unu al la plej grandaj landaj movadoj. Tamen ŝajnas, ke ankoraŭ mankas firma strukturo al la sovetiaj movadaj organizaĵoj, tiel ke necesas iom pacienci por atingi kunordigitan E-agadon en la tuta vastega lando. La alfluo de individuaj membroj el Sovetio, post unuafoja konsento de UEA akcepti kotizojn en rubloj, fortigis la kontaktojn inter UEA kaj la lokaj movadoj, kiuj nuntempe ludas la plej gravan rolon tie.

Ĉina Esperanto-Ligo reformis sian strukturon por ebligi la aliĝon de provincaj asocioj. Tio signifas, ke ĈEL povos ludi pli konsekvenca tutlandan rolon ol ĝis nun, ĉar ankoraŭ en Ĉinio plimulto de la agado okazas sur loka nivelo. La granda ondo da intereso tie pli-malpli finiĝis, kaj la strukturoj por teni la lernintojn bezonas plifortigon.

Esperiga evoluo estas kreskanta kunlaboro inter samregionaj landaj asocioj en Eŭropo. Avangardas la nordiaj landoj, kiuj starigis Kunlaboran Komisionon kun regulaj renkontiĝoj. Aperas signoj, ke tiu kunlaboro pli-malpli baldaŭ pli-

vastiĝos ĝis la baltaj landaj asocioj. Ankaŭ la balkanaj landoj trovis sian vojon al komuna konferenco, dum politikaj ŝanĝoj malfermas perspektivon al pli da kunagado en meza Eŭropo. Aliflanke de la mondo, la kunlaboro fortiĝas en Pacifiko, kaj la nova Estraro klopodas stimuli similan evoluon en aliaj regionoj.

Pluraj sudamerikaj asocioj havas financajn problemojn, pro grandskala inflacio kaj aliaj ekonomiaj faktoroj; ankaŭ Jugoslavio suferis pro similaj kialoj. Menciindas tamen sukcesoj de Brazilia Esperanto-Ligo, kiu nun funkciigas ampleksan kaj profitdonan libroservon.

das nek al la bezonoj, nek al la disponeblaj rimedoj.

AFRIKA AGADO

La pasinta jaro estis la deka de la afrika agado sub komisiito Hans Bakker. La movado en Afriko nun atingis tian staton, ke UEA ne havas rimedojn por sola subteni ĝian plian disvastiĝon. Feliĉe la ĝemelado de afrikaj kluboj kun kluboj en pli riĉaj landoj disvastiĝas, kvankam malrapide. UEA do ne plu emfazas varbadon en Afriko, sed plibonigon de la ekzistantaj esperantistoj kaj memstarigon de la agado.

Modela tiurilate estas la disvolviĝo de la movado en Togolando, kun reto de aktivaj kluboj kaj propra pedagogia agado. En 1989 ĝi komencis aperigi (kun la subteno de UEA) diversajn eldonaĵojn pri sia agado, inkluzive

UEA-komisiito Philippe Chavignon estis ravita de la zairia movado.



AZIA AGADO

Dum la jaro juna pola Cseh-instruisto, Joachim Werdin, vojaĝis tra aziaj landoj, instruante la lingvon kaj stimulant la fondon de grupoj kaj asocioj. Tio aparte sukcesis en Malajzio kaj Singapuro. Artikolserio pri liaj spertoj aperis en *Esperanto* kaj rezultigis dekojn da kontaktoj inter aziaj kaj okcidentaj grupoj. UEA pagis trionon de la kostoj de Werdin, kiu en 1990 daŭrigos sian agadon en Singapuro kaj aliaj landoj.

La nova estrarano pri la azia agado, So Gilsu, vizitis Ĉinion en novembro, kaj komencis intertrakti kun la aziaj landaj asocioj de UEA pri interŝanĝado de prelegvojaĝantoj. Al landoj sen asocio oni provos sendi "vizitantajn delegitojn" laŭ la modelo de Werdin. Tiu multloka agado anstataŭos la planojn pri Azia Centro en Ŝanhajo, ĉar la Estraro konstatis, ke ĝi respon-

simplan literaturon. Pluraj aliaj landoj iras tiun vojon, kvankam ne tiel rapide.

La Asocio pagis la vojaĝon de franca Cseh-instruisto, Philippe Chavignon, kiu pasigis plurajn semajnojn en Zairio kaj entute tri monatojn en suda Afriko fine de la jaro. Liaj surlokaj kontaktoj kun la gvidantoj de la zairia, mada-gaskara kaj aliaj movadoj i.a. helpis faciligi la kunlaboron inter ili kaj UEA.

SUDAMERIKA AGADO

La konferencon pri "Esperanto en Iberameriko", kiun la kuba asocio organizis fine de 1988, sekvis diskuto pri komuna agado inter pluraj landoj el Suda Ameriko. Projekto pri internacia revuo ankoraŭ ne efektiviĝis. La nova estrarano pri regiona agado, Roman Dobrzyński, proksime kunlaboros kun la landaj asocioj pri la ebloj de translima kunagado en tiu kontinento.

Du seminarioj en Eŭropo, bela progreso ekster ĝi

En la 51-a jaro de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, la Estraro strebis plifortigi la gvid-strukturojn de la organizo, prioritare en la kampoj aktivula trejnado, ekstera agado kaj ekstereŭropigo. La junulara movado en diversaj landoj bele progresis, sed la eŭropaj sekcioj de TEJO plejparte stagnis.

GVIDORGANOJ KAJ ADMINISTRADO

Dum la 45-a IJK en Kerkrade, Nederlando, okazis ordinara kunveno de la Komitato de TEJO. Krome la Komitato funkciis per poŝtaj voĉdonoj kaj informcirkuleroj. En Kerkrade la Komitato elektis novan estraron 1989-91 kaj alektis komitatanojn C.

Dum la unua parto de la jaro estiĝis serioza krizo en la TEJO-estraro, kiu parte ne funkciis ĝis Kerkrade. La elektoj alportis urĝe bezonatajn novajn fortojn. Kiel prezidanto reelektiĝis Jan Koszmaluk (Pollando). Novaj estis la vicprezidanto (Yves Bellefeuille, Kanado), ĝenerala sekretario (Louise Frith, Britio), kasisto (Hardo Bourguignon, Nederlando), kaj estraranoj Thorsten Bendias (Germana DR) kaj Saskia Idzerda (Nederlando). La malnova kasisto Claude Rouget restis kiel estrarano pri servoj kaj financoj. La nova estraro kunsidis tuj post la IJK en la CO en Roterdamo kaj novembre en Strasburgo, Francio. Unu el ĝiaj prioritatoj estas la evoluigo de reto de estraraj komisiitoj ŝarĝitaj per specifaj taskoj. Aktuala listo de komisiitoj kaj komisionoj troviĝas sur p. 45 de la Jarlibro 1990.

La rilatoj kun la Estraro de UEA kaj la CO estis bonaj. TEJO estis reprezentata en la UEA-komitato per du komitatanoj A (Haase, Koszmaluk), dum la TEJO-prezidanto estis regule invitata al la kunsidoj de la UEA-estraro kiel observanto. La Centra Oficejo, sub la gvido de ĝia direktoro Neil Salvesen, montris rekonon de pluraj TEJO-aktivecoj kaj ofte subtenis ilin. Bedaŭrinde ne funkciis la UEA-komisiono pri junularo, nek eblis trovi longdaŭran volontulon por labori por TEJO en la CO.

Financa ordigo enkondukita de Claude Rouget daŭris sub Hardo Bourguignon, kiu, loĝante proksime

de la CO, povis rapide solvi aron da financaj demandoj interkonsente kun la Oficejo. La jaro finiĝis kun pozitiva saldo, kaj la IJK montris iom da profito.

	kostoj	rimedoj
buĝeto 1989	23 500 gld.	23 500 gld.
rezulto 1989	18 795 gld.	23 025 gld.
IJK 1989	124 664 gld.	133 132 gld.

La individua membraro de TEJO kontentige kreskis en 1989, kaj aliĝis ankaŭ pli alta nombro de Patronoj. Ekskluditaj estas la junaj UEA-membroj kun Gvidlibro, kiujn TEJO ne konsideras kiel individuajn membrojn de TEJO, kaj al kiuj ĝi ne liveras siajn servojn. Fine de la jaro TEJO eldonis varbilon por individuaj membroj, kunlabore kun UEA.



*La zorgoj tro multas:
TEJO-sekretario Louise Frith
(kun prezidanto Jan Koszmaluk,
dekstre) demisiis post kelkaj monatoj.*

SERVOJ

Dum 1989 regule aperadis la organo *TEJO-tutmonde*, servante kiel oficiala komunikilo inter la estraro, komitato kaj membraro, kaj kiel informilo pri la junulara esperantista vivo. Ĝin redaktis Andy Künzli. Pro tranĉoj de la UEA-buĝeto, kaj malgraŭ protestoj de TEJO, *Kontakto* aperis nur 4-foje. Ni ŝuldas dankon al Leif Nordenstorm, kiu redaktis la revuon dum plenaj ses jaroj. En 1990 transprenis ĝin István Ertl, post ununumera redaktado de F. Javier Moleón, kaj oni intencas denove ligi la enhavon de *Kontakto* kun la temoj de TEJO-seminarioj.

Denove aperis, en Pollando, gvidlibro de la Pasporta Servo. TEJO entreprenis paŝojn por mem eldoni tiun gravan servon, daŭre sur senprofita bazo kaj je pli alta teknika nivelo.

MOVADA AGADO

Kiel supre dirite, la 45-a IJK, organizita de Nederlanda Esperanto Junularo, estis la plej granda el ĉiuj okcidenteŭropaj IJK-oj, kun ĉ. 600 partoprenantoj. La kongrestemo estis "Transporto", al kiu dediĉiĝis pluraj kunsidoj kaj ekskursoj, sed por multaj plej elstaris la muzika programo. Jam definitivaj estas la kongreslandoj por 1991 (Karlskoga, Svedio) kaj 1994 (Suda Koreio). Venis neformala invito por 1992 el Slovakio.

La politikaj ŝanĝoj en la mondo influas ankaŭ la junularan Esperantomovadon. Ekde 1990 TEJO esperas eluzi la kreskintajn ŝancojn por la organizado kaj vojaĝado de junaj esperantistoj. La elstara evoluo en Sovetunio ankoraŭ okazas ekster la kadroj de TEJO, same kiel daŭra progreso en pluraj ekstereŭropaj landoj. Dum la IJK en Kerkrade aliĝis du novaj landaj sekcioj, de Kubo kaj Zairio.

El la fakaj sekcioj de TEJO – BEMI (bicklistoj) kaj KOKO (naturprotekto) – la agado de la dua stagnis. Oni ankaŭ ĝenerale ne sukcesis levi la nivelon de la studenta agado, kvankam la pola sekcio pluevoluigis la revuon *Studenta gazeto*, redaktatan de Jarek Miklasz. Lanĉi strategion por la studenta agado restas unu el la plej gravaj taskoj por la sekvonta jaro.

La eksteraj rilatoj de TEJO prosperis en 1989. Krom la tenado de rutinaj kontaktoj kun pluraj neregistraj organizaĵoj, okazis KER-seminario en Grésillon, Francio, kun subvencio de la Eŭropa Junulara Fondaĵo, kaj dua en la Eŭropa Junulara Centro en Strasburgo. TEJO aktive partoprenis en la 13-a Monda Festivalo de Junularo kaj Studentaro en Pjongjang, Norda Koreio (tri personoj), en la Pariza Festivalo "Junularo por la defendo de demokratiaj principoj" (trideko), kaj en Unesko-Konsultiĝo de Junularaj Neregistraj Organizaĵoj en Dagomys, Sovetunio (du personoj, unu en la sovetia delegacio). Krome ĝiaj reprezentantoj partoprenis en pluraj konferencoj, laborkunvenoj kaj seminarioj de la ĉefaj eŭropaj junularaj organizaĵoj.

Detalaj jarraportoj aperis en *TEJO-tutmonde*, n-roj 45 kaj 46 (1990).

Kulturo:

Ĉiam pli grave rolas la aŭdvidaj artoj

Tra la tuta antaŭa estrarmandato mankis gvidado en ĉi tiu fako. Post la brajtona UK eklaboris nova estrarano pri kulturo (Spomenka Štimec), klopodante unue ricevi superrigardon pri la kultura agado de la landaj asocioj. Montriĝis, ke kulturo nur sporade rolas en ties programo. Tamen indas eĉ pri tiaj necentraj agadoj raporti al la landaj kulturministerioj, kion la plej multaj landaj asocioj ne kutimas fari. Štimec sendis unuan leteron al la koncernaj ministerioj fine de la jaro.

Esperanto denove ricevis honoran lokon. En Estonio la originala romano de Hendrik Adamson, *Auli* (1934), finfine aperis ankaŭ en la denaska lingvo de la verkisto. En Japanio kaj Brazilo aperas ĉiujare kelkaj valoraj, plej ofte ekster la kadro de la landa asocio.

Pri rehavigo de klasikaĵoj zorgas la eŭropaj eldonejoj Iltis (*Turstrato 4*, kaj aparte *Naŭ poetoj*, kies unua eldono neniam atingis la merkaton), Hungara Esperanto-Asocio (*La granda aven-*

riojn (speciale menciindas la ampleksa programo lige kun la Jaro de Edmond Privat). Kooperativo de Literatura Foiro kun sia enhave kaj grafike ĉiam pli atentokapta revuo kaj aktiva muzikeldona fako grave kontribuas al nia kulturo. Kaj venas freŝaj impulsoj el Sovetunio, kiuj metas alian geografian akcenton sur tiu kampo.

La jaro 1989 estis rimarkinda pro subita alfluo de novaj muzikaj kasedoj – kaj la unua kompakta disko, tiu de Kajto, kiu bone vendiĝis. Entute la parola kulturo de Esperantio, nun disvastigebla ankaŭ per vidbendoj, akiras ĉiam pli gravan rolon. Tial UEA nun donas plurajn paĝojn de la Jarlibro al la listigo de podiaj artistoj kaj



La slovaka rokgrupo Team' atingis la pinton de populareco en sia hejmlando, kaj koncertis Esperante ĉe IJK kaj UK.

La ĉefa kontribuo de pluraj landoj estas sur la kampo de eldonado. La estonta kongreslando Kubo aperigis kvar infanajn bildlibrojn ĉe la fremdlingva eldonejo José Martí. Bonvenigante ilin, ni devas peti pli severan lingvan redaktadon de estontaj eldonaĵoj. Ĉinio restas nia plej regula vartejo de la porinfana literaturo. Ĝi daŭre kontribuas ankaŭ al plivastigo de popularscienca literaturo (*Antikvaj filozofoj de Ĉinio*, *Kuriozaj floroj kaj arboj*) kaj konigo de la ĉina kulturo (*Kamelo Ŝjangzi*). Irano sekvigis la luksan eldonon de *La robaĵoj de Omar Kajjam* en tridek lingvoj per simila tradukaro el la poeto Hafez, en kiu

turo), kaj la nova Pro Esperanto el Vieno (*Tra l' silento* kaj multaj malpli konataj verketoj). La du lastaj eldonejoj kunlaboris por aperigi la plej diskutatan verkon de la jaro, *La bona lingvo* de Claude Piron. Ĉe HEA cetere aperis unu el la plej gravaj libroj de la jardeko: *Trezoro – cent jaroj de Esperanta novelarto*.

Internacia Kultura Servo en Jugoslavio restas nia plej regula flegejo de la (pup)teatra arto, kvankam malpli nombre ol en antaŭaj jaroj: en la festivalo PIF 1989 prezentigis “nur” kvar profesiaj E-teatraĵoj. Kultura Centro Esperantista en Svislando regule okazigas kulturajn kaj klerigajn semina-

klopodas plivastigi la rolon de la UK kiel festivalo de nia kulturo. Ekde 1990 oni festos tie ankaŭ Tagon de la Libro. Nova komisiito de UEA, Andrzej Pettyn, esploras pri manieroj eluzi kaj plifortigi la internaciajn radio-elsendojn en Esperanto, kiuj faras daŭre gravan servon al nia parola kulturo. En 1989, dum aliaj stacioj restis stabilaj, la elsendoj de la Estona Radio plioftiĝis ĝis unu fojon semajne.

La Belartaj Konkursoj de UEA okazis en 1989 la 40-an fojon, kun kontentiga nombro de konkursaĵoj. La nivelo de la plej bonaj verkoj, krom en la poezia branĉo, tamen ne estis tre elstara.

Ampleksaj planoj bezonas multajn novajn membrojn

Daŭris la revigliĝo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kiu prizorgas kunlabore kun UEA la kampon de la internacia Esperanto-instruado. Inter la aranĝoj, kiujn ĝi organizis aŭ aŭspiciis en 1989, estis la 7-a Internacia Metodika Seminario (Poprad, Ĉeĥoslovakio), dua intensa kurso por instruistoj en Kultura Centro Esperantista (La Chaux-de-Fonds, Svislando), la 23-a ILEI-konferenco (Caerleon, Kimrio), kaj la 1-a Azia Konferenco pri la Instruado de Esperanto (Nanning, Ĉinio). Dum la Universala Kongreso en Brajtono ILEI denove organizis la Tagon de la Lernejo.

Dum 1989 okazis sep sesioj de la nove lanĉitaj Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI – jam la unuan jaron en kvar kontinentoj. Sukcesis 49 kandidatoj el 15 landoj je la elementa aŭ meza niveloj. La gvidlibro pri la ekzamenoj aperis en julio kaj jam atingis duan eldonon. En 1990 ILEI eldonos la regularon kaj priskribon de la supera nivelo.

La oficiala organo de ILEI *Internacia pedagogia revuo* aperis kvarfoje dum la jaro, enhavante riĉan diversecon de fakaj artikoloj, raportoj kaj anoncoj.

Kvarfoje aperis ankaŭ la lernejana revuo *Juna amiko*, sub aŭspicio de ILEI. Ĝi nun atingis eldonkvanton de 4 500 ekzempleroj. Ekzistas planoj pri la eldono de pedagogia kursmaterialo kaj diversaj informiloj. En 1989 aperis ĉe UEA *Bibliografio de universitataj kaj altlernejaj diplomverkoj, disertaĵoj kaj tezoj pri Esperanto kaj interlingvistiko* de E. Symoens. Pliajn bazajn informojn pri la stato de la E-instruado provizis la unua Monato de Internacia Enketado lanĉita de ILEI.

Por doni pli firman bazon al siaj ampleksaj projektoj, la estraro de ILEI decidis starigi fondaĵon. Tiu portas la nomon de prof. d-ro István Szerdahelyi, eminenta pedagogo kaj verkisto, prezidinto de ILEI de 1985 ĝis 1987. Donacemaj homoj, kiuj volas subteni la internacian instruadon de Esperanto, tial estas petataj kontribui al la Fondaĵo Szerdahelyi.

ILEI havas kunlaboran interrilaton kun Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, reto de infanaj Esperanto-klasoj kun centro en Kalifornio, Usono. Ĝi intencas starigi kunlaboron kun Monda Konsilio por Dotitaj kaj Talentaj Infanoj. Ĝiajn rilatojn kun Unesko prizorgis dum 1989 F. Lo Jacomo en Parizo. Pro la

politikaj ŝanĝoj en orienta Eŭropo, ILEI esperas baldaŭ akiri novajn landajn sekciojn kaj multajn novajn membrojn.

Ne eblas fini superrigardon pri la pasinta jaro sen menciigi la sendependan iniciaton de kelkaj hungaraj instruistoj, kiuj starigis la t.n. Fondaĵon Talento por apliki la pedagogiajn ideojn de László Polgár. En lernejo apud Budapeŝto, ekde oktobro 1989, klaso de 22 infanoj faras la plimultajn lecionojn en Esperanto. Oni celas, ke diverslandaj esperantistoj instruos sian denaskan lingvon al la infanoj. Sur aparta kampo, laŭdindas la fidela prizorgo de Koresponda Servo Mondskala fare de R. Llorens. Pro malsano lia, transprenonto de tiu grava servo de UEA estas daŭre ŝercata.

Oszkár Princz (Hungario) klarigas la integriĝon de Esperanto en la hungara eduksistemo, kadre de la Tago de la Lernejo en Brajtono. ILEI-estraranoj S. MacGill kaj A. Childs-Mee sekvas atente.



Faka agado kaj scienca aplikado:

Jaro de la terminaro

FAKAJ ASOCIOJ

La progreso de Esperanto grandparte dependas de la faka agado, kaj tiu ĉi agado preskaŭ sen escepto okazas en la kadroj de fakaj asocioj. Tradicie UEA malmulton iniciatis sur tiu tereno, limigante sian kunlaboron al prezentoj en la Jarlibro kaj la Universalaj Kongresoj. En 1989 estrarano Oszkár Princz lanĉis enketon inter la fakaj asocioj, celante interŝanĝon de spertoj kaj plifortigon de la "horizontala" kunlaboro inter samtipaj aŭ similaj asocioj. Tiu laboro daŭros. La estrarano pri eksteraj rilatoj unuafoje donos apartan atenton al la spertoj kaj bezonoj de la fakaj asocioj, kiuj en pluraj kazoj (ekz. IFEF, UMEA) havas viglajn kontaktojn ekster la movado.

Nur kelkaj fakaj asocioj havas memstaran jaran kongreson: la plimulto kunvenas kadre de UK. En tiu situacio la agado plej klare videblas en la revuo-organo de la asocio. Tiurilate klare viglas la filozofoj (FAT), la atistoj (ATEO), la fervojistoj (IFEF), la bahaanoj (BEL) kaj kelkaj aliaj, dum daŭre ampleksiĝas la turisma agado, kadre de Monda Turismo aŭ en la formo de sendependaj esperantistaj vojaĝoficejoj. Aliflanke, pluraj fakaj asocioj kun revuo ne montras grandan aktivecon kaj pluraj eĉ ne aperigas regulan informilon.

SCIENCA APLIKADO

La ĉefajn sciencajn konferencojn dum la jaro organizis Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS), kun unu sesio en Krynica, Pollando, kaj unu en San Marino. Fine de la jaro AIS subskribis kontraktojn kun la urbo kaj teknika altlernejo de Bjalistoko, Pollando, por la establo de pola filio tie. Esperantistoj en la universitatoj Eötvös Lóránd (Hungario) kaj Dankook (Koreio) peris ties ĝemeliĝon, metante apartan emfazon sur kunlaboro inter la Esperanto-fakoj. Daŭris preparoj por Internacia Esperanta Scienc-teknika Universitato en Pekino (kiel ankaŭ de ĉina AIS-sesio), kvankam iom bremsitaj i.a. pro nesufiĉa engaĝiĝo de alilandaj esperantistoj-sciencistoj. Ĉinaj fakuloj tamen restas en aktiva kontakto kun siaj okcidentaj kolegoj.

La estrarano pri scienca aplikado, So Gilsu, vojaĝis tra Sovetunio kaj orienta Eŭropo fine de la jaro, prele-

gante publike pri ekonomiko kaj korea kulturo kaj kontaktante sciencistojn uzantajn Esperanton. Plioftigo de tiaj prelegvojaĝoj inter Eŭropo kaj Azio estas grava celo en lia programo, same kiel plibonigo de la komunikado kaj kolektado de informoj pri la sukcesa scienca apliko de Esperanto.

Fakvojaĝo de UEA-estrarano So Gilsu ligis sciencajn aplikadon kun la azia agado. Ĉi tie li kunsidas kun inĝ. Pluhař (maldekstre), rektoro Eichler, kaj du studentinoj de la Ekonomia Universitato en Prago.



ELDONAGADO

Plej rimarkinda trajto de la pasintjara eldonado estis ses altkvalitaj fakaj terminaroj, pri insekta morfologio, fervojoj, geologio, komputiko, orgenoj, kaj bibliotekoj. Tiu laboro ankoraŭ ne ŝuldiĝas al la iniciatoj de Terminologia Esperanto-Centro (vd. sube), sed al la talento kaj sindediĉo de po kelkaj individuoj en la koncerna fako.

Krom kelkaj scienc-popularigaj verkoj, en Ĉinio aperis ankaŭ japana medicina verko: *Orienta speciala diina masaĝo* de masaĝisto-esperantisto Masayuki Saionji, kiun jugoslavaj esperantistoj rapide tradukis kaj eldonis nacilingve. Pri medicino menciindas ankaŭ *Sukurado kaj tujaj flegoj*, praktika gvidilo pri unua helpo de franco Christian Bertin. Tiu ĉi ankaŭ lanĉis la eldonadon de Esperanta scienca bulteno kun studoj kaj tradukoj de francaj sciencistoj, sub la nomo *Scienca bukedo*. Du 60-paĝaj numeroj aperis en 1989. La originala studo *Psikosocia problemaro de internacia turismo*, de AIS-profesoro Tyburcjusz Tybłewski, traktas ankaŭ aspektojn de la Esperanto-movado.

TERMINOLOGIA ESPERANTO-CENTRO

En 1989 TEC organizis sian unuan terminologian seminarion, en Poprad, Slovakio. Partoprenis 19 homoj el naŭ landoj, sub la gvido de ĉeflektoro Edmund Brent, profesia terminologo el Kanado.

Surbaze de enketo inter siaj anoj, TEC decidis aliĝi al la internacia terminologia reto TermNet. La kontaktoj kun ties patrona organizaĵo Infoterm evoluis tre pozitive, kaj rezultigis i.a. la transdonon de valora heredaĵo de Wüster al Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Estas dungita nova sekretario de TEC, Ankica Jagnjić, kiu en aŭgusto partoprenis en la unua somera lernejo de TermNet. Fine de 1989 oni starigis apartan oficejon por TEC en Zagrebo, Jugoslavio, utiligante financon subtenon i.a. de la DLT-projekto en Nederlando.

Malgraŭ la progreso, necesas konstati ke preskaŭ la tuta laboro de TEC okazas sub la kutimaj libertempaj kondiĉoj de la Esperanto-movado. Ĝi urĝe bezonas pli vastan kunlaboron de esperantistoj-fakuloj por plenumi sian taskaron.

Esploro kaj dokumentado:

Ĉu kunordigo CEDos antaŭ ondo de interesiĝo?

Per volumo 13 (1989) de la revuo *Language Problems and Language Planning* (Lingvaj problemoj kaj lingvoplanado), finiĝis la kunlaboro inter CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo) kaj la eldonejo de la Teksasa Universitato. Ekde volumo 14 la revuon aperigas la scienca eldonejo Benjamins, en Amsterdam. Nova redakta teamo instaliĝis. Ĝin gvidas d-ro Probal Daşgupto (Hinda Unio), kaj kunlaboras por Eŭropo d-ro Klaus Schubert kaj por Nordameriko d-ro Humphrey Tonkin. D-ro Frank Nuessel estas recenza redaktoro. En 1989 la revuo aperis en siaj kutimaj tri numeroj sub redakto de d-ro Tonkin kaj la financaj rezultoj, post plurjara subvenciado de UEA, estis pozitivaj.

La agado de CED dum la jaro konsistis interalie el sukcesa Esperantologia Konferenco kadre de la Universala Kongreso en Braĵtono, kaj la jam tradicia Novjorka Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado en decembro. La konferenco, kune organizita de CED kaj la Traduka Fakto de Unuiĝintaj Nacioj, traktis politikajn aspektojn de la internacia lingva komunikado. Partoprenis sesdeko da fakuloj kaj funkciuloj de UN.

Ekde la braĵtona UK nova estraro deĵoras en CED, ĉiam sub gvido de d-ro Tonkin. Fondiĝis ĉe la Universitato de Hartford, en Usono, filio de CED kiel oficiala esplorcentro de la Universitato. Tiu filio jam komencis ambician planon de agado, precipe en formo de konferencoj kaj seminarioj. La nova estrarano pri esploro kaj dokumentado, d-ro Ulrich Lins, komencis esplori pri katalogado de la Biblioteko Hodler.

En 1989 *Informilo por interlingvistoj*, redaktata de Ryszard Rokicki, atingis sian 20-an numeron. Sub la ŝildo de CED aperis baza bibliografio pri diplomverkoj kaj aliaj universitat-nivelaj studoj pri Esperanto kaj interlingvistiko, kompilita de Edward Symoens. La reeldono de *Lingvo kaj vivo* same kontribuis al pliriĉigo de la havebla literaturo. Ĉe la usona eldonejo University Press of America aperis la unua volumo en la Aktoj de CED, *Language in Religion*, kiu prezentas

la referaĵojn el tiutema konferenco de CED de antaŭ du jaroj. La libro enhavas ampleksajn resumojn en Esperanto.

Ekster la kadro de CED la interesiĝo pri esperantologio kaj rilataj demandoj restis forta. Ĉe la prestiĝa lingvistika eldonejo Mouton de Gruyter aperis anglalingva studaro, *Interlinguistics* (red. Klaus Schubert), al kiu kontribuis ankaŭ pluraj kunlaborantoj de CED, dum la juna esploristo Gerald Chan amplekse traktis la pozicion de Esperanto en Ĉinio kadre de verko eldonita de Oxford University Press.

Fondumo Zamenhof:

Severaj bremsoj ne senesperigas

La politikaj kaj ekonomiaj perturboj de 1989 en Pollando kaj aliloke havis sian efikon je evoluo de la planoj krei en Bjalistoko kulturan kaj edukan centron por la Esperanto-movado je la nomo de la iniciatinto de Esperanto, Zamenhof. Ne nur ŝanĝiĝis la personaro ligita surloke al la projekto, sed ankaŭ okazis severaj ekonomiaj bremsoj, precipe rilate al konstruadaj projektoj en Pollando.

Malgraŭ ĉio ĉi, la preparlaboroj

Modelan formon de kunlaboro kun ekstermovadaj instancoj montris Germana Esperanto-Instituto, kies 10 000-era libraro estas nun disponebla por publika uzo en la urba biblioteko de Aalen en sudokcidenta Germanio.

Rimarkinda estas la agado en Sovetunio kaj meza Eŭropo. Ĉe la moskva Instituto de Lingvoscienco, branĉo de la Sovetia Akademio de Sciencoj, kreiĝis interlingvistika branĉo sub gvido de d-ro Sergej Kuznecov. Ĉe la 22-a Konsultiĝo de la Esperanto-Asocioj en la Socialismaj Landoj, aprile en Moskvo, ekformiĝis Internacia Kunordiga Komitato de Interlingvistoj. Estas esperinde, ke la multaj kompetentaj fakuloj en tiu regiono evoluigos sian agadon ankaŭ en la kadro de CED, kiu ludas kaj povas ankoraŭ ludi gravan kunordigan rolon.

daŭris, sub gvido de Ewa Siurawska el Varsovio, kaj poste de la surloka direktoro de Fondumo Zamenhof, s-ro J. Parzyszek. Grava atingo estis tio, ke la pola registaro proponis al Unesko la listigon de la proponata Centro inter la oficialaj projektoj de la Jardeko por Kultura Evoluo. La projekto troviĝas inter kvar polaj projektoj akceptitaj de Unesko kaj tiel rajtigitaj utiligi la helpon moralan kaj fincan de tiu organizaĵo.

Finaj vortoj:

Trovi novajn formojn de kunlaboro

Ĉi tiu raporto havas iom novan formon, iom malpli protokolecan, pli koncizan, pli facile legeblan. Ni volis per tio emfazi, ke ankaŭ la tuta agado de UEA dum la lastaj jaroj akiras novan formon, kies esenca trajto estas maksimuma malfermiteco kaj klopodo plekti kiel eble plej multajn esperantistojn en la organizitan laboron por la internacia lingvo. Tio estis la senco de la pasintjara klopodo trovi kaj nomi plurdekon da komisiitoj i.a. por kelkaj tute novaj laborkampoj. Kun novaj Estraro kaj Komitato, kun pluraj novaj landaj asocioj, tiaj klopodoj estis kaj restas farataj ankaŭ sur ĉiuj aliaj niveloj de la movada strukturo. Kiom ni sukcesos dependas de la grado de

nia komuna engaĝiĝo en la serĉado de novaj kaj pli taŭgaj formoj de nia agado.

Ĉu 1989 estis sukcesa jaro por Esperanto kaj por UEA? Jes. Ĝi estis tia por la mondo, kiu trovis novajn formojn de kunlaboro, kaj ĝi sekve estis sukcesa ankaŭ por ni kiel integra parto de tiu mondo. Se en 1989 sukcesis fali unu el la plej "obstinaj baroj", tiu inter la okcidento kaj oriento de Eŭropo, tio devus signifi por ni, ke per persisto kaj celtrafa laboro dissaltos aliaj. 1990 ne estas simple unu plia nova jaro, sed ĝi estas la plej nova kaj la plej promesplena jaro de la lastaj jardekoj. Ni faru ĝin tia ankaŭ por Esperanto.

Financaj aldonaĵoj al la Raporto:


(Ĉiuj sumoj estas en nederlandaj guldenoj.)

Spezokonto de Universala Esperanto-Asocio por la jaro 1989

KOSTOJ	Buĝeto	Rezulto
Salajroj, malnete	386 225	374 487,38
Sociaj asekuroj pagitaj de UEA	82 735	70 997,39
Volontula servo	5 000	15 546,82
Senimpostaj suplementoj	14 340	14 397,00
Kafo, teo, lakto	2 200	1 334,11
Kompensoj pro malsano	-500	-2 240,02
Salajroj ktp, nete	490 000	474 522,68
Afranko, nete	18 500	19 208,48
Telekomunikiloj	6 000	8 133,58
Presaĵoj	8 000	12 143,69
Materialoj	8 000	7 456,75
Riparo kaj prizorgo de maŝinoj	15 000	13 006,69
Revizoro	5 000	2 000,00
Administraj kostoj ĝeneralaj	1 000	516,91
Fotokopiado	4 000	3 422,07
Fotokopiado (vendoj/kompensoj)	-2 000	-1 807,30
Centra Oficejo, nete	63 500	64 080,87
Gasoj, elektro	12 000	8 702,55
Akvo	600	720,12
Riparo de la Domo	1 000	837,87
Purigado kaj purigiloj	1 500	6 746,86
Asekuroj	2 000	3 414,15
Impostoj je la Domo	4 000	1 862,49
Luoj ricevitaj	-500	-250,00
Oficeja Domo, nete	20 600	22 034,04
Preskostoj de <i>Esperanto</i>	41 000	42 531,00
Afranko/ekspedo	67 000	71 272,96
Grafiko	16 500	26 870,98
Kovertoj	3 000	4 604,40
Anoncoj	-14 000	-11 216,80
Esperanto, nete	113 500	134 062,54
Preskostoj de la Jarlibro	23 000	26 890,00
Afranko/ekspedo	20 000	19 725,93
Grafiko	6 000	5 472,59
Kovertoj	1 500	1 132,00
Anoncoj	-13 000	-11 583,35
Jarlibro, nete	37 500	41 637,17
Preskosto de <i>Kontakto</i>	4 000	4 070,03
Sendokostoj	4 300	4 787,91
Ekspedlaboro & kovertoj	2 500	2 574,94
Grafiko	6 200	6 308,53
Redakto	2 000	2 000,00
Anoncoj	-300	-1 168,80
Kontakto, nete	18 700	18 572,61

Vojaĝkostoj estraraj	16 000	27 358,28
Vojaĝkostoj komisionaj ktp	4 000	3 580,76
Vojaĝkostoj oficejaj	3 000	2 042,68
Vojaĝkostoj kongresaj	4 000	8 143,45
Reprezentaj kostoj	3 000	3 014,78
Vojaĝkostoj ktp	30 000	44 139,95
Korespondado, Estraro	8 000	5 370,11
Korespondado, komisiitoj ktp	1 500	215,24
Korespondokostoj entute	9 500	5 585,35
Bankokostoj	3 000	1 770,13
Kurzodiferencoj	1 000	908,76
Antaŭa jaro	0	-12 844,08
Belartaj Konkursoj	2 000	2 544,25
Diversaj kostoj	500	8,97
Ĝeneralaj kostoj	6 500	(7 611,97)
Amortizo de la Domo: 1%	2 800	2 794,46
-renovigo/pligrandigo: 3%	5 120	5 123,35
Amortizo de la inventaro (CO): 20%	4 820	9 454,23
Amortizo de la telefonsistemo: 10%	1 875	1 868,62
Amortizo de la fotokompostilo: 20%	2 785	5 623,63
Amortizo de la komputilo: 20%	13 000	21 061,89
Amortizo de la programoj k.s.: 20%	7 100	11 745,52
Amortizoj entute	37 500	57 671,70
Sumo de la kostoj	827 300	854 694,94
RIMEDOJ (enspezoj)	Buĝeto	Rezulto
Kotizoj Membro-Gvidlibro	5 500	6 871,41
Kotizoj Membro-Jarlibro	34 200	35 962,72
Kotizoj Membro-Abonanto	237 300	242 384,34
Kotizoj MJ-Kontakto	3 800	6 263,31
Kotizoj MA-Kontakto	7 700	9 365,00
Kotizoj de individuaj membroj	288 500	300 846,78
Aligitaj membroj	29 800	29 315,97
Aligitaj membroj junaj	8 700	8 098,99
Simplaj abonoj <i>Esperanto</i>	9 200	10 031,01
Kolektivaj abonoj <i>Esperanto</i>	11 300	7 321,90
Abonoj kaj vendoj <i>Kontakto</i>	7 200	10 202,31
Kolektivaj abonoj <i>Kontakto</i>	3 600	5 106,29
Societo Zamenhof	28 900	23 789,49
Kotizoj de fakaj organizoj	3 800	3 619,00
Minus parto por TEJO	-6 000	-6 551,83
Kotizoj entute	385 000	391 779,91
Donacoj al la Ĝenerala Kaso	25 000	16 798,86
Vendoj de la Libroservo	370 000	276 078,82
Aĉetoj/ŝanĝo stokvalora	-212 000	-204 200,64
Libroservo, malnete	158 000	71 878,18
Minus tantiemoj	-12 000	0
Minus katalogokostoj (kontribuo) ..	-16 000	-16 804,97
Libroservo, nete	130 000	55 073,21
Vendoj de la Eldona Fakoj	0	75 088,20
Aldonoj	0	-107 515,98
Ŝanĝo en stokvaloro	0	61 802,92
Tantiemoj	0	-5 549,58
Eldona Fakoj, nete	0	23 825,56


ELSPEZOJ



SUPERRIGARDO DE LA SPEZOJ DE UEA

Ĉi tiuj grafikaĵoj bildigas la plej gravajn en- kaj elspezojn de UEA en 1989. Tiucele ĝi kunigas la rezultojn de la Spezokonto kun la plej signifaj fondaĵoj. Ĝia celo estas nur ilustra: por la detaloj de la kostoj kaj rimedoj oni rigardu la ciferojn.

ENSPEZOJ



Abonservo, nete	6 000	9 403,48
Grafikaj servoj CO	40 000	42 960,80
Aliaj servoj CO	18 000	17 554,56
Servoj entute	64 000	69 918,84
Kompenso – programaro	10 000	7 542,40
de Kapitalo Dumvivaj Membroj	30 000	31 900,69
Administrado, Inst. Hodler	2 500	2 500,00
de Propaganda Konto pro informado	10 000	10 000,00
Kompensoj entute	52 500	51 943,09
Kotizoprocentaĵo 74-a UK	80 000	96 352,33
Subvencioj	30 000	6 580,00
Diversaj enspezoj	2 500	4 876,99
Rento ricevita	65 000	81 249,68
Rento pagita	-30 000	-28 542,96
Rento, nete	35 000	52 706,72
Sumo de la rimedoj	804 000	769 855,51
Negativa saldo	23 300	84 839,43
Sumo de la kostoj	827 300	854 694,94

Valorpaperoj, Mantingh	—	343 289,00
Valorpaperoj entute	574 948,07	1 035 502,00
Ricevotaj rimedoj	35 103,79	59 994,32
Saldoj, Mantingh	—	89 859,10
Antaŭpagitaj kostoj	9 504,43	30 110,12
Debitoroj	229 225,05	147 704,54
Institucio Hodler '68	88 426,69	76 353,65
Garantiaj sumoj	6 930,00	10 325,00
Debitoroj ktp entute	369 189,96	414 346,73
Stokoj libroservaj	548 509,64	198 266,34
Stokoj, Eldona Fakoj	—	386 063,62
Presaj, materialoj k.s.	33 626,97	20 584,00
Provizoj entute	582 136,61	604 913,96
Maŝinoj ktp, CO	61 714,47	70 651,49
Komputilaj aparatoj, CO	59 212,42	56 123,24
Programaro	43 498,65	46 982,07
Telefonsistemo	18 686,16	16 817,54
Maŝinaro ktp, Roterdamo	183 111,70	190 574,34
Bilanca valoro, Novjorko	1,00	1,00
Domo de UEA, Roterdamo	279 446,11	276 651,65
Renovigo/pligrandigo	170 778,48	165 655,13
Tereno Aspremont	1,00	1,00
Nemoveblaĵoj	450 225,59	442 307,78
Sumo de la aktivoj	3 117 591,16	3 572 117,14

Bilanco

de Universala Esperanto-Asocio
je la 31-a de decembro 1989

(por komparo aperas ankaŭ la stato fine de 1988)

AKTIVOJ	1988	1989
Kasoj diversaj	4 617,45	2 873,88
Kurantaj bankokontoj	111 978,11	129 124,76
Ŝparkontoj kaj deponoj	823 212,63	730 921,41
Blokita monrimedoj	18 170,04	21 551,28
Kasoj/bankokontoj entute	957 978,23	884 471,33
Akcioj	346 537,00	393 891,00
Obligacioj	228 411,07	298 322,00

PASIVOJ

Antaŭricevitaj rimedoj	51 065,79	49 456,72
Pagotaj kostoj	192 277,92	136 011,88
Pendantaj spezoj	8 543,46	4 445,74
.....	251 887,17	189 914,34
Kreditoroj	797 691,17	963 351,90
Deponoj de membroj	568 566,12	624 116,78
Kreditoroj k.s. entute	1 618 144,46	1 777 383,02
Rezervo por debitoroj	51 255,38	34 389,77
Kongresa Rez. Fondaĵo	74 772,79	71 992,90
Rezerva Fondaĵo IJK	9 488,97	15 950,97

Rezervo – emeritoj, CO	43 900,00	45 500,00
Aliaj sumoj rezervitaj	24 282,83	31 319,81
Rezervoj entute	203 699,97	199 153,45
Fondaĵo Afriko	3 500,00	3 500,00
Fondaĵo Azio	10 379,85	10 084,70
Fondaĵo Canuto	1 831,58	(984,24)
Fondaĵo Enciklopedio	1 989,21	2 009,21
Fondaĵo Grabowski	52 042,38	51 989,26
Fondaĵo Junularo	11 909,76	17 020,78
Fondaĵo Kantoj	13 647,27	14 000,47
Fondaĵo Scienco & Tekniko	2 571,56	2 388,98
Fondaĵo Universala Ekspozicio ..	6 514,40	5 695,02
Fondaĵo Wüster	29 386,56	30 188,44
Propaganda Konto	1 301,20	4 406,41
Triamonda Kongresa Fondaĵo ...	44 414,74	47 273,91
Fondaĵoj entute	179 488,51	187 572,94
Kapitalo Dumvivaj Membroj	416 703,76	441 177,96
Kapitalo Azio	480 630,00	468 535,84
Cetera kapitalo	245 322,02	583 133,36
Saldo de spezoekonto	-26 397,56	-84 839,43
Asocia kapitalo entute	1 116 258,22	1 408 007,73
Sumo de la pasivoj	3 117 591,16	3 572 117,14

Evoluo de fondaĵoj de UEA dum 1989

Fondaĵo Afriko jarkomence (3 500 en sekcio Kipro)	3 500
Donacoj	21 322
Elspezoj	-35 597
Subvencio el Propaganda Konto	14 275
Jarfine (3 500 en sekcio Kipro)	3 500

Fondaĵo Azio	10 380
Rento, Kapitalo Azio	24 518
Al Kapitalo Azio	-6 001
Elspezoj, nete	-18 812
Jarfine	10 085

Fondaĵo Canuto jarkomence	1 832
Donacoj	5 162
Kotizoj pagitaj	-19 528
Subvencio el Propaganda Konto	11 550
Jarfine	(984)

Fondaĵo CED jarkomence	0
Esperanto-dokumentoj, nete	223
Elspezoj	-3 086
Subvencio el Propaganda Konto	2 863
Jarfine	0

Fondaĵo Enciklopedio jarkomence	1 989
Donacoj	20
Jarfine	2 009

Fondaĵo Grabowski jarkomence ..	US\$ 26 044	52 042
Donacoj ricevataj	US\$ 1 770	
Kostoj kaj elpagoj	-US\$ 667	
Saldo	US\$ 27 147	51 989
Rento kreditota jarfine	US\$ 2 349	4 497

Fondaĵo Junularo jarkomence	11 910
Enspezoj	25 956
Elspezoj	-20 845
Jarfine	17 021

Fondaĵo Kantoj jarkomence	13 647
Rento	663
Premio	-310
Jarfine	14 000

Fondaĵo Scienco & Tekniko jarkomence	2 572
Donacoj	817
Elspezoj	-1 000
Jarfine	2 389

Fondaĵo UN/Unesko jarkomence	0
Donaco	50
Elspezoj	-2 534
Subvencio el Propaganda Konto	2 484
Jarfine	0

Fondaĵo Wüster jarkomence	29 387
Enspezoj	11 727
Elspezoj	-10 926
Jarfine	30 188

Propaganda Konto jarkomence	1 301
Enspezoj	51 584
Elspezoj	-48 479
Jarfine	4 406

Triamonda Kongresa Fondaĵo jarkomence	44 415
Enspezoj	8 323
Elspezoj	-5 464
Jarfine	47 274

Evoluo de rezervoj de UEA dum 1989

Rezervo Debitora jarkomence	51 255
Deskriboj	-16 865
Jarfine	34 390

Kongresa Rezervo jarkomence	74 773
59-a UK	-130
73-a UK	-2 650
Jarfine	71 993

Rezerva Fondaĵo IJK jarkomence	9 489
43-a IJK	4 501
44-a IJK	1 961
Jarfine	15 951

Rezervo por emeritaj oficistoj jarkomence	43 900
Elpago	-500
Rento	2 100
Jarfine	45 500

Rezervita jarkomence rilate UEA de Novjorko ..	7 312
Pozitiva saldo, UEA de Novjorko	6 064
Jarfine	13 376

Buĝetpropono de Universala Esperanto-Asocio por la jaro 1991

KOSTOJ

Salajroj, malnete	431 000
Sociaj asekuroj pagataj de UEA	82 500
Senimpostaj suplementoj	16 000
Aliaj	1 500
Neta kosto de Oficistaro	531 000
Afranko, nete	20 000
Telekomunikiloj	8 000
Presaĵoj	10 000
Materialoj	8 000
Riparo kaj prizorgo de maŝinoj	18 000
Revizoro	2 000
Administraj kostoj ĝenerale	1 000
Fotokopiado	2 000
Centra Oficejo, nete	69 000
Gasoj, elektro, akvo	10 750
Riparo de la Domo, purigo k.s.	7 000
Impostoj je la Domo, asekuro k.s.	5 500
Luoj riceveblaj	-250
Oficeja Domo, nete	23 000
Preskostoj de <i>Esperanto</i>	45 000
Afranko/ekspedo	73 000
Grafiko	25 500
Kovertoj	4 500
Anoncoj	-11 500
<i>Esperanto</i>, nete	136 000
Preskostoj de la Jarlibro	28 000
Afranko/ekspedo	20 000
Grafiko	6 000
Kovertoj	1 500
Anoncoj	-11 500
Jarlibro, nete	44 000
Preskostoj de <i>Kontakto</i>	4 000
Afranko/transporto	4 750
Ekspedlaboro & kovertoj	2 500
Grafiko	6 250
Redakto	2 000
Anoncoj	-500
<i>Kontakto</i>, nete	19 000
Vojaĝkostoj Estraro de UEA	17 000
Vojaĝkostoj komisiitoj ktp	6 000
Vojaĝkostoj oficejaj	4 000
Vojaĝkostoj kongresaj	5 000
Reprezentadokostoj	4 000
Vojaĝ- kaj restadkostoj k.s.	36 000
Korespondokostoj Estraro ktp	9 000
Bankokostoj	2 000
Diversaj kostoj	1 000
Ĝeneralaj kostoj	3 000

Amortizo de la Domo: 1%	2 700
Renovigo/pligrandigo: 3%	4 800
Inventaro: 20%	12 500
Telefonsistemo: 10%	1 500
Komputilo: 20%	10 000
Programoj: 20%	11 500
Amortizoj entute	43 000

Sumo de la kostoj **913 000**

RIMEDOJ

Kotizoj MG (Membro kun Gvidlibro)	7 000
Kotizoj MJ (Membro kun Jarlibro)	37 000
Kotizoj MA (Membro-Abonanto)	260 000
Kotizoj MJ-K (kun <i>Kontakto</i>)	8 000
Kotizoj MA-K (kun <i>Kontakto</i>)	13 000
Aligitaj membroj de UEA	28 500
Junaj aligitaj membroj	10 500
Simplaj abonoj, <i>Esperanto</i>	10 000
Kolektivaj abonoj, <i>Esperanto</i>	8 000
Abonoj kaj vendoj, <i>Kontakto</i>	9 000
Kolektivaj abonoj, <i>Kontakto</i>	5 500
Societo Zamenhof	25 700
Kotizoj de fakaj organizoj	3 800
Pago al TEJO	-8 500
Kotizoj kaj abonoj	417 500

Donacoj al la Ĝenerala Kaso **15 000**

Libroservo, favora saldo	78 000
Katalogaj kostoj	-16 000
Libroservo, nete	62 000

Eldona Fakoj, favora saldo	25 000
Tantiemoj	-6 000
Eldona Fakoj, nete	19 000

Abonservo, nete	8 000
Grafikaj servoj de CO	45 000
Diversaj servoj de CO	15 000
Servoj entute	68 000

De Inventaro pro programado	10 000
De Kapitalo Dumvivaj Membroj	30 500
Kompensoj, laboro en CO	25 500
Kompensoj	66 000

Kotizoprocentaĵo 76-a UK	100 000
Turismo	10 000
Kongresoj kaj turismo	110 000

Diversaj enspezoj **6 000**

Rento, nete **60 000**

Sumo de la rimedoj	823 500
Deficito	89 500
Sumo de la kostoj	913 000

Fino de la Estrara Raporto 1989

Tri manieroj helpi UEA


Ĉu laŭ vi mankas io en ĉi tiu jarraporto? Nu, ekzistas pli pozitivaj rimedoj por ŝanĝi tion, ol nur kritiko – kvankam ankaŭ ĝi estas utila! UEA daŭre suferas pro manko de mon- kaj homfortoj, kiuj ebligas al ĝi plibonigi kaj plivastigi sian agadon. Jen tri tre konkretaj manieroj kontribui al ĝia plifortiĝo.

VARBI MEMBROJN

De jardekoj UEA ne havas multe pli ol sep mil individuajn membrojn. Tamen la nombro de aktivaj kaj pagipovaj esperantistoj estas multe pli granda. Ofte sufiĉas proponi al ili membriĝon, por ke ili aldonu siajn fortojn al nia komuna mondorganizo.

Nia nova trijara membrokampanjo bezonas vian helpon. Nur vi kapablas persone aliri la esperantistojn en via regiono. Kaj tia persona peto povas bonege sukcesi. En unu urbo en Brazilo, la kvar lokaj membroj de UEA sukcesis varbi sep novajn aliĝantojn. Se vi trovas nur unu novan membron, tio jam estus valora kontribuo.

UEA eldonis varbilojn, “DUE” kaj “TEJO”, kiuj haveblas senpage de la Centra Oficejo. Kaj ni restas je via dispono por alispecaj informoj aŭ helpo.



SUBTENI FONDAĴON

Ekzistas dua maniero kreskigi la membraron de UEA. Vi povas mem donaci membriĝon al amiko en nepagipova lando. Ĝuste tie oni pleje bezonas ligiĝon kun la monda movado.

Sed se vi ne jam havas tian amikon, UEA havas ankaŭ fondaĵon por tiu celo. El Fondaĵo Canuto pli ol 400 homoj jare ricevas donacan membrecon en UEA. Kompreneble, vi rajtas specifi la landon aŭ regionon, por kiu ni uzos vian propran kontribuon.

Alispecan helpon al la evoluantaj Esperanto-movadoj provizas la Fondaĵoj Afriko kaj Azio. El ili venas mono por libroj kaj aliaj materialoj, subvencioj por poŝt- kaj vojaĝ-kontaktoj, foje por la sendo de instruisto. Kaj se temas pri la venigo de lokaj aktivuloj al la internaciaj Esperanto-centroj kaj -kongresoj, tiucele ekzistas la Fondaĵo Tria Mondo.

UEA havas Fondaĵojn ankaŭ por aliaj gravaj agadoj: interalie scienca eldonado, terminologio, UN kaj Unesko, ktp. Krome la klubo de patronoj Societo Zamenhof donas valoregan moralan kaj financon apogon. Detaloj troviĝas sur paĝoj 32-34 de la Jarlibro 1990. Via subteno ebligas multajn agadojn, kiuj alie restus nur revo.




TRANSPRENI TASKON

Plej valoraj, kompreneble, estas viaj propraj tempo kaj energio. Se vi volonte aktivus por Esperanto en internacia kadro, UEA povus doni al vi la taŭgan strukturon.

Ekzistas jam bone difinitaj postenoj en UEA: ĉefdelegito, komitatano, estrarano. Sed ekzistas ankaŭ pli-malpli senlimaj ebloj por aktivaj kiel komisiito, pri tiu agadkampo kiu plej interesas vin kaj pri kiu vi posedas kompetenton kaj kunlaboremon.

Pri kiu ajn speco de agado, kontaktu unuavice la estraranon aŭ alian homon, kiu jam respondecas pri tiu kampo. Denove la Jarlibro donas fidindan superrigardon. Bonvolu ne skribi al la Centra Oficejo se eviteble, kaj bonvolu ankaŭ esti preta adapti viajn aspirojn al la kapabloj kaj bezonoj de la Asocio laŭ ties Strategia Plano (ekzemplero senpage havebla de la CO). Tamen ankaŭ ni faros nian eblon kontentigi vin!



Al ĉiuj novaj kaj malnovaj membroj, koran dankon!

Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al la redaktoro de ĉi tiu rubriko: s-ro Georges Larglantier, 29 bvd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la elsendhoroj laŭ Universala Tempo (UTC), antaŭe nomata Grenviĉa Meza Tempo (GMT).

ĈIUTAGE

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 41.27m (7270 kHz), 31.01m (9675 kHz). Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.

11.00-11.25 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 31.50m (9525 kHz), 25.34m (11840 kHz).

11.00-11.30 Pekino, 43.13m (6955 kHz), 31.64m (9480 kHz). Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.

13.00-13.30 Pekino, 25.75m (11650 kHz), 19.78m (15165 kHz).

15.30-15.55 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 25.39m (11815 kHz).

17.30-18.00 Varsovio, 48.90m (6135 kHz), 41.18m (7285 kHz), 31.45m (9540 kHz).

20.00-20.30 Pekino, 40.16m (7470 kHz), 31.58m (9500 kHz), 30.10m (9965 kHz).

20.30-20.55 Varsovio, 42.11m (7125 kHz), 41.99m (7145 kHz), 31.50m (9525 kHz).

21.30-21.55 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22m (6095 kHz), 48.90m (6135 kHz), 42.11m (7125 kHz), 41.27m (7270 kHz), 41.18m (7285 kHz).

22.00-22.30 Pekino, 30.49m (9860 kHz), 26.05m (11515 kHz).

LUNDE

12.30-12.40 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

23.00-23.30 Vilnius, 25.49m (11770 kHz), 24.88m (12060 kHz), 19.76m (15180 kHz), 16.99m (17655 kHz), 16.96m (17690 kHz). Nur kvar minutojn (kutime la finajn) kadre de anglalingva elsendo. Litova Radio, Esperanto-fako, SU-232674 Vilnius, Litovio, Sovetunio.

MERKREDE

01.15-01.25 Berno, 49.22m (6095 kHz), 48.90m (6135 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz), 16.92m (17730 kHz).

03.15-03.25 Berno, 48.90m (6135 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).

07.45-07.55 Berno, 31.38m (9560 kHz), 21.92m (13685 kHz), 16.98m (17670 kHz), 13.83m (21695 kHz).

10.45-10.55 Berno, 22.00m (13635

kHz), 19.27m (15570 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.78m (21770 kHz).

13.15-13.25 Berno, 31.19m (9620 kHz), 25.65m (11695 kHz), 19.27m (15570 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.83m (21695 kHz), 11.68m (25680 kHz).

15.15-15.25 Berno, 21.92m (13685 kHz), 19.44m (15430 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.87m (21630 kHz).

17.15-17.25 Berno, 30.35m (9885 kHz), 25.09m (11955 kHz), 19.32m (15525 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.78m (21770 kHz).

22.15-22.25 Berno, 30.58m (9810 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz), 19.27m (15570 kHz).

ĴAŬDE

05.00-05.15 Vatikano, 186m (1611 kHz), 48.01m (6248 kHz), 41.38m (7250 kHz), 30.75m (9755 kHz), 25.61m (11715 kHz), kaj FM 103.8 MHz. Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

12.30-12.40 Berno, kiel lunde.

20.20-20.30 Tallinn, 290m (1035 kHz), 50.63m (5925 kHz). Estona Radio, Esperanto-fako, SU-200100 Tallinn, Estonio, Sovetunio.

22.30-23.00 Vilnius, 451m (666 kHz), 49.18m (6100 kHz). Kvar minutojn, kiel lunde.

SABATE

12.30-12.40 Berno, kiel lunde.

20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, Centro Corrispondenza, I-00100 Roma, Italio.

Okfoje Berno, kiel merkrede.

DIMANĈE

04.05-04.30 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 21.85m (13730 kHz), 19.60m (15410 kHz). O.R.F., Esperanto-fako, A-1136 Wien, Aŭstrio.

08.00-08.20 Havano, 25.35m (11835 kHz). Radio Habana Cuba, Esperanto-sekcio, Apartado 70-26, La Habana, Kubo.

08.20-08.30 Tallinn, kiel ĵaŭde.

08.50-09.00 Budapeŝto, FM 67.05 MHz, 67.97 MHz, 68.24 MHz, 68.36 MHz, 68.48 MHz, 68.72 MHz, 69.38 MHz, 70.10 MHz, 70.43 MHz, 70.64 MHz, 72.08 MHz. Programo preparita de Radio Pécs, Esperanto, Pf. 200, H-7601 Pécs, Hungario.

13.05-13.30 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 21.85m (13730 kHz), 19.44m (15430 kHz), 13.96m (21490 kHz).

17.00-17.30 Havano, 31.46m (9535 kHz), 25.63m (11705 kHz), 25.51m (11760 kHz), 25.06m (11970 kHz), 19.63m (15285 kHz), 19.56m (15340 kHz).

18.30-19.00 Havano, 25.42m (11800 kHz), 19.61m (15300 kHz), 19.45m (15425 kHz).

19.00-19.10 Vatikano, 570m (526 kHz), 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 48.01m (6248 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.10m (9645 kHz), 16.92m (17730 kHz), 13.86m (21650 kHz), kaj FM 93.3 MHz, 96.3 MHz, 105.0 MHz (ankaŭ je festotagoj).

21.45-22.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

22.00-22.20 Havano, 19.61m (15300 kHz), 19.45m (15425 kHz).

22.30-23.00 Havano, 50.13m (5985 kHz), 25.19m (11910 kHz), 25.10m (11950 kHz), 25.06m (11970 kHz).

DIREKTITAJ ONDOJ

Berno: je la 01.15h al Centra Ameriko kaj nordo de Suda Ameriko; je la 03.15 al Centra kaj Norda Ameriko; je la 07.45h kaj 10.45h al Malproksima Oriento kaj Pacifiko; je la 13.15h al Proksima Oriento kaj Azio; je la 15.15h al Proksima Oriento kaj Orienta Afriko; je la 17.15h al tuta Afriko; je la 22.15h al Suda Ameriko. **Havano**: je la 08.00h al Okcidenta Norda Ameriko kaj Pacifika Azio; je la 17.00h kaj 22.30h al Ameriko; je la 18.30h kaj 22.00h al Eŭropo kaj la Mediteranea regiono; je la 22.40h al Suda Ameriko. **Pekino**: je la 11.00h al Japanio kaj Koreio; je la 13.00h al Sudorienta Azio; je la 20.00h al Eŭropo; je la 22.30h al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano**: 17730 kaj 21650 je la 19.00h al Afriko. **Vieno**: 15410 kHz al Proksima Oriento; 15430 kHz al Malproksima Oriento; 21490 kHz al Afriko.

ALIAJ STACIOJ

(regiona aŭdebleco; horoj laŭ loka tempo)

Brazilo: Sorocaba (ZYK669), 1080 kHz, sabate, 20.00-21.00h; Rio de Janeiro (ZYJ462), 1400 kHz, dimanĉe, 10.30-10.45h (Brazila Spiritisma Federacio).

Kreskas la intereso pri Esperanto en Kamerunio, dank' al lastatempa informkampanjo, kaj nun tre mankas lerniloj. Krom lernolibroj kaj kasedoj ni serĉas instruprogramojn por du personaj komputiloj Amstrad PWC 5125 kaj unu Amstrad PC 1640. Bonvolu respondi al Duala Esperanto-Grupo, BP 7407, Douala (pĝk CCP 1415/57).

Hotelestro dez. kor. tm. pri turismo, vojaĝado, E-movado, lingvoj ktp. Kolektas bk, pm, cigaredojn, E-aĵojn. Peras kontaktojn kun loka E-klubo. Elemér Kelemen, str. Unirii 3, bl. 3, sc. A. ap. 9, R-4055 Covasna, Rumanio.

Pentristo, loĝanta en bela montara urbo, dez. kor. tm. Alexander Kalugerov, "Ivan Jonkov" n-ro 3, BG-5350 Trjavna, Bulgario.

23-jara komencanto dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. André Carlos, Avenida Luciano Carneiro 840, Fatima Fortaleza, Ceará, 60 410 Brazilo.

Se vi estas fakulo emerita aŭ libera kaj parolanto de Esperanto, bv. anonci vin al mi. Laŭ viaj fakoj, speciala tekniko k.s. ni pritraktos vian enkondukon ĉe fabriko, entrepreno, instituto kaj aliaj instancoj, kiuj bezonas vian fakon kaj viajn teknikojn. Pri la detaloj kontaktu s-ron Wang Xigen, Shitai-xian, Ren-shi-jun, Anhui, CN-245100 Ĉinio.

Verkantoj por **Kontakto!** Bonvolu sendi viajn kontribuojn al la nova redaktoro: István Ertl, Kecskeméti u. 13, H-1053 Budapest, Hungario.

"MOTNAIP-LUDO" – Nova ludkartaro por praktiki Esperanton kaj amuziĝi. Partoprenu en monda ĉampioneco pri "Motnaip-ludo". Petu kompletan informon de "TUTMONDE", Apartat 313, E-08220 Terrassa, Hispanio.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon.

Anoncetoj

Financan subtenon por la kompleta renovigo de ejo kiel kultura E-centro en Slovenio serĉas E-societo "Liberiga stelo", Pk. 27, YU-54001 Osijek, Jugoslavio.

Dez. kor. pri ĉiuj temoj inĝ. Donka Blagoeva Dramska, Ĵ. R. "V. Ivanov", bl. 341, eniro B, et. 4, ap. 35, BG-1309 Sofio, Bulgario.

Deziras korespondi pri pentroarto kun pentristoj, arthistoriistoj, artŝatantoj; petas por diplomblaboro (kontraŭ rekompenco laŭ interkonsento) ajna lingvaj materialojn (ekde 1975) pri la temo "F. Clouet kaj la skolo de Fontainebleau" Natalia Aroloviĉ, SU-121019 Moskvo G-19 do vostrebovanija, Soveta Unio.

Por nova eldonota muzika terminaro en Esperanto (de samideano sinjoro A. Marshall el Anglujo) mi volonte volas scii pli pri la kanto-metodoj en via lando. Mi jam menciis la metodojn de: N. Brouw, Fr. Husler, Otto Iro, R. Maragliano Mori, Fr. Martienssen-Lohmann, Charles Panzera, W. Seidner, E. Sittner, J. Stockhausen kaj Corn. van Zanten. Respondu al muzik-delegito A. L. Broekema-Clemens Schröner, Kroonkampweg 58, NL-9752 Haren, Nederlando.

Vartistino 59-jara deziras gekorespondantojn el Britujo, Jugoslavio, Italujo, Hispanujo, Usono, Israelo. F-ino Claude de Coudenhove, 104 faubourg Madeleine, F-45000 Orléans, Francujo.

Kantoj de Georgo Handzlik: *Sur Placo de Ĉiela Pac' (Tjenanmen)* – dumkoncerta kasedo (18 SFR); 22 *Baladoj* – kantareto kun muziknotoj (4 SFR). Mendu ĉe: Eldonejo KLEKS, 43-346 Bielsko-Biała, Braterska 41, Pollando.

Libroservoj! Petu liston de E-sonkasedoj de LINGVO-STUDIO! Dinnyés: AL VENKO!, Händel: MESIO!, Ĵomart & Nataŝa, Korusa Festivalo, ktp. H-1675 Budapest, Pk. 87, Hungario.

Mi pretas donaci mian kolekton de poŝtmarkoj (proks. 5 000, plejparte kolektitaj inter 1930 kaj 1950) al tiu kiu reciproke donacos kelkcent dolarojn (usonajn) aŭ egalvaloran sumon al UEA. Unue skribu al mi petante fotokopiojn de ekzemplaj tri paĝoj en la albumoj kiuj interesas vin (ĉu antikvaj britaj markoj, ĉu japanaj, ĉu germanaj...). La plej malavara ricevos la kolekton. Ralph A. Lewin, 8481 Paseo del Ocaso, La Jolla, CA 92037, Usono.

Se ne al IJK, do ek al IJS! Partoprenu Internacian Junularan Semajnon IJS-90 inter 03-09 aŭgusto. Internacia medio, feria etoso. Organizanto: LINGVO-STUDIO, Budapest (adreso supre).

Radio Freŝa Aero deziras la novaĵojn, kiujn ni en Usono neniam aŭdas. Se vi havas ion, kion la usonanoj devus scii, bonvolu sendi ĝin al: FRESH AIR RADIO, Attn: André Guirard, 1518 E. Lake St. Suite 209, Minneapolis MN 55407, Usono. Bonvolu inkluzivi artikolojn el ĵurnaloj, se vi havas. Kaj se vi volas esti intervjuita, sendu telefonnumeron.

GRANDAJ EVENTOJ OKAZAS EN ORIENTEŬROPAJ LANDOJ

Legu en "SENNACIULO"
Monata organo de S.A.T.

- la raportojn
- la artikolojn

de SAT-membroj el tiuj landoj.

Proveksemplero kun abontarifo havebla
kontraŭ internacia respondkuponon ĉe:
S.A.T., 67 avenue Gambetta, F-75020 PARIS

Kun la konsento de la familio Salvesen,
UEA transprenis ĉiujn stokojn de la eldonejo

ESPERANTAJ KAJEROJ

La enspezo pro tiuj libroj eniros la kapitalon de la Volontula Fondaĵo (vidu paĝon 88 el aprilo). UEA vendas ilin kun la kutima triona rabato ekde tri ekzempleroj: bonvolu turni vin al la Libroservo.

Pro la forpaso de Neil Salvesen, la ĝisnuna direktoro de la CO, UEA serĉas kandidatojn por la posteno de

GVIDA ADMINISTRANT(IN)O.

Ni atendas de la dungoto sperton pri oficeja kaj financa administrado, plenan regon de Esperanto kaj vastan konon de la Esperanto-movado, same kiel maturan, diplomatan kaj reprezentan personecon. Kandidatigaj leteroj kun plenaj biografiaj informoj estu adresitaj al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Se necese, bv. telefoni +31 10 436 10 44 (Simo Milojević).

LA KULTURA ESPERANTO-DOMO

Kastelo "Grésillon"

F-49150 BAUGÉ – Francujo
telefono: 41 889 10 34



*havas por proponi
al la internacia esperantistaro
agrablajn, riĉenhavajn somer-renkontojn
en tre turisma franca regiono.*

15-a de junio/ 02-a de julio	E-kursoj, gvidataj konversacioj, ekskursoj, promenadoj, distraj vesperoj
02-a/16-a de julio	Serio de diverstemaj prelegoj kaj parolaj interŝanĝoj, ekskursoj kaj E-kursoj, distraj vesperoj
17-a/31-a de julio	"Lernu kaj praktiku": Kursoj, gvidataj konversacioj, ekskursoj, distraj vesperoj
1-a/15-a de aŭgusto	"Lernu kaj praktiku", kun novaj gvidantoj, promenadoj, ekskursoj, distraj vesperoj
15-a/31-a de aŭgusto	Kursoj por diversnaciaj lernantoj; "La arto traduki" (dum la dua semajno), gvidataj konversacioj, ekskursoj, distraj vesperoj

ĈIUJN DETALITAJN INFORMOJN PETU DE LA ĈI-SUPRA ADRESO.
KONFIRMO DE REZERVADO NUR KONTRAŬ POŝTMARKO AŬ RESPOND-KUPONO.

La firmao

Pres-Esperantista Asocio

- produktas kaj distribuas en- kaj eksterlande: la periodaĵojn *Bulgara esperantisto* kaj *Panorama Esperanto* (bulgarlingvan), librojn, lernilojn de Esperanto, reklamajn materialojn, sonkasedojn, gramofondiskojn, suvenirojn k.a.,
- importas kaj vendas en Bulgario E-literaturon kaj aliajn esperantaĵojn,
- publikigas en siaj eldonaĵoj kaj peras reklamannoncojn,
- laŭmende presas kaj bindas.

Adreso: p.k. 66, BG-1000 Sofia, Bulgario
tel. 22 80 86 aŭ 31 00 29
tlx. 23599 kabini bg

Juna estas tiu, kiu sentas sin tia . . .

INTERNACIA JUNULARA SEMAJNO,
IJS-90

03-09 aŭgusto, Sződliget, Hungario



Se ne al IJK, do ek al IJS! Internacia medio, feria etoso!
Informoj ĉe: LINGVO-STUDIO, pk. 87, H-1675 Budapest
Telefono: +36-1-1288258

La Oomoto-Lernejo de Japanaj Tradiciaj Artoj

Du-semajna seminario por Esperantistoj, kiu emfazas la efektivan praktikon de tradiciaj artoj de Japanio.

datoj: 1990 aŭgusto 10-25.

loko: Kameoka, Japanio.

plena prezo (inkluzivas loĝon, manĝojn, ktp.):

US\$500 por homoj el pagipovaj landoj,

US\$300 por nepagipovaj.

Petu informon kaj aliĝilon de: Internacia Fako, Oomoto, Kameoka-si, Kyoto-hu, 621, Japanio.

La problemoj. La solvoj.

La rolo de planado

en la homa komunikado.

Kaj la kontribuo de Esperanto.

Redaktas: Probal Daŝgupto,
Klaus Schubert, Humphrey Tonkin

Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Individua abono: 54,00 gld. / US\$27.00
Institucia abono: 105,00 gld. / US\$ 52.50

Abonu pere de la Libro servo de UEA.

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and
Documentation of World Language Problems